

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Stefan MacGill

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Mireille Grosjean

Miroslav Hruška

Dennis E. Keefe

Zsófia Kóródy

Katalin Kováts

Albrecht Kronenberger

Lee Jungkee

Stefan MacGill

Svetlana Mirošničenko

Johano Petik

Radojica Petrović

Venkatesh Reddy

Vilorg Teräväinen

Zlatko Tišljar



ilei

ENHAVO

| | |
|---|----|
| Jozefo NÉMETH: <i>Enkonduko</i> | 3 |
| <i>Karaj legantoj</i> (Zsófia KÓRÓDY) | 4 |
| Dennis KEEFE: <i>BEK-kurso kaj la tradicia Cseh-kurso (II.)</i> | 5 |
| Miroslav HRUŠKA (Miropiro): <i>Kiel prelegi pri Esperanto?</i> | 10 |
| Zlatko TIŠLJAR: <i>Mia saĝo post 50 jaroj de instruado de E-o</i> | 14 |
| Mirejo GROSJEAN: <i>Malsama ekvilibro inter skriba lingvo kaj parola lingvo</i> | 18 |
| Svetlana MIROŠNIČENKO: <i>Esperanto-belarta literaturo kiel rimedo [...]</i> | 20 |
| Zsófia KÓRÓDY: <i>Spertoj de lernejoj grupoj en Komenius-projekto GUTO</i> | 23 |
| <i>El la landoj kaj sekcioj</i> (CN, FR, KR, PL, CH) | 25 |
| <i>Riskumu kaj gajnu</i> (Katalin KOVÁTS) | 28 |
| <i>Novajoj pri la 46a ILEI-konferenco en Herzberg/Sieber</i> | 29 |
| 2014: ILEI konferencos en Montevideo (Radojica PETROVIĆ) | 31 |
| <i>Nekrologoj pri Sarasavani Vaidyanath, Manfred Ritthaler kaj Boriša Ritthaler</i> ...34 | |
| <i>Pri lingvo per simplaj vortoj</i> (reago de Vilorg TERÄVÄINEN)..... | 35 |
| <i>Internaj kaj eksteraj kondiĉoj de evoluo</i> (reago de Johano PETIK)..... | 39 |
| <i>Informoj pri ILEI kaj nia redakcio</i> | 41 |

ESTRARO DE LA LIGO

- Vicprez.:** Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. <zsofia.korody@esperanto.de>. Tel./fakso fiksaj: (+49) 5521-5983. Aganta prez. ĝis la Konf. LKK de la 46a konferenco, E-centroj, instrukapablado, ekzamenoj.
- Sekretario:** Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <ilei.sekretario@gmail.com> por sekretariaj aferoj, <radojica.petrovic.rs@gmail.com> alie. Tel. fiksa (+381) 32 371053. Sekretariaj taskoj, edukprojektoj kaj konferencoj.
- Estrarano pri financoj:** Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. fiksa (+ 510) 653 0998. Financaj kaj kasistaj aferoj.
- Vicsekr.:** Magdaléna FEIFIČOVÁ (Fejfi), Bernolákova 25/5, SK-010 01 Žilina, Slovakio. <ilei.officejo@gmail.com>. Membro-administrado, rilatoj kun aliaj fakaj asocioj.
- Estrarano:** Bharat GHIMIRE, G.P.O. Box 10518, Kathmandu, Nepalo. <nespa.1990@gmail.com>. Tel. (+1) 620 9877. Eksteraj rilatoj, universitata agado.
- Estrarano:** GONG Xiaofeng (Arko), School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Azia agado, universitata agado.
- Estrarano:** Stefan MACGILL, Pannónia u 30.I.6, HU-1136 Budapest, Hungario. <stefan.macgill@gmail.com>. Tel. fiksa (+36 1) 349-5207. Juna amiko, kurso e125, retejoj, rilatoj kun UEA.
- Estrarano:** Enikő ZENGŐ SEREGHY, Dózsa u.14. 2/8, HU-4400 Nyíregyháza, Hungario. <enimyster@gmail.com>. Tel. portebla: (+ 36) 203234365. Instrukapablado, ekzamenoj, kalendaro, membro-varbado.
- Estrarano:** Penny VOS, Aŭstralio <penivos@yahoo.com>. Landa kaj lerneja agado, eksteraj rilatoj, instrumaterialoj, reta kontaktado.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford; AdE¹

Vicprezidanto: Detlev Blanke,
Germanio, Prezidanto de la Societo
pri Interlingvistiko

Membroj:

Vera Barandovská-Frank, Germanio,
Universität Paderborn; AIS²

Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elsah

Renato Corsetti, Italio, Università degli
Studi di Roma „La Sapienza”; AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU, Indian
Statistical Institute, Kolkata; AdE¹

Michel Duc Goninaz, Francio,
Université de Provence; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių
universitetas

Wim Jansen, Nederlando, Universiteit
van Amsterdam

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Iona Koutny, Pollando/Hungario,
Uniwersytet im. Adama Mickiewicza
w Poznaniu; AdE¹

Maria Majerczak, Pollando, Uniwer-
sytet Jagielloński w Krakowie

Geraldo Mattos, Brazilo, Federacia
Universitato de Paranao; AdE¹

Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия
Сельскохозяйственного
Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet
u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

Sekretario: Aida Čižikaitė, Litovio

¹ AdE – Akademio de Esperanto

² AIS – Akademio Internacia de la
Sciencoj, San-Marino

Titolpaĝe: *Lingvaj kursoj kaj sesio
de KER-ekzamenoj en Grésillon,
kunlabore kun ILEI, jam la trian
fojon. Vidu la raporteton de Stefan
MacGill sur p. 25.*

Enkonduko

Karaj Legantoj,

En la nuna numero ni daŭrigas la komparadon de la BEK-kurso kaj la tradicia Cseh-kurso danke al s-ro KEEFE. Post la (viv)resuma artikolo de Franz-Georg RÖSSLER (Germanio) en IPR 13/1, estas nun la vico de Zlatko TIŠLJAR (Slovenio) kolekti siajn duonjarcentajn spertojn pri instruado. Ankaŭ la temo kaj nomo de Svetlana MIROŠNIČENKO (Rusio) povas esti konataj al niaj fidelaj legantoj, ĉar ŝi plurfoje verkis por ni artikolojn pri la ebloj utiligi literaturon en la instruado. En la numero prezentigis juna ĉeĥa kolego, Miroslav HRUŠKA, kiu laŭ la instigo de nia vicsekretario verkis artikolon pri la temo „Kiel prelegi pri E-o?”

Nia Ligo staras antaŭ gravaj ŝanĝoj: meze de julio ni ekhavas novan Prezidanton. Pri la temo legu la enkondukan artikolon de nia vicprezidanto. Por la prezida posteno momente ni havas du kandidatojn, iliajn (alitemajn) artikolojn vidu sur paĝoj 18, 27 kaj 31.

La nuna numero alportas ankaŭ malgajajn novaĵojn: forpasis tri eminentaj gekolegoj. La nekrologo pri s-ino Saranath (Barato) aparte malfruas, ĉar la informo pri ŝia morto alvenis al nia redakcio nur nun. Pardonu pro la malfruo! Karaj Saranath, Manfred kaj Boriša, ripozu en paco!

Jozefo NÉMETH, redaktoro

Karaj legantoj

Pro ŝanĝoj en la ILEI-estraro gravas klarigi la novan situacion, kaj ni uzas la plej konvenan formon informi vin ĉiujn per tiu enkonduko al la nova numero de IPR:



Kiel konate, por troŝarĝiteco, tro multaj samtempaj farendaĵoj, nia prezidanto, Stefan MACGILL, kiu dum multaj jaroj tiom sindone, plenenergie laboris por la bono de la Ligo, decidis rezigni kiel prezidanto de ILEI. Grandan dankon li meritas de ni ĉiuj pro la refortigado de ILEI en harmonia kunlaboro kun la aliaj estraranoj, pro la atingoj en la interna stabiligo kaj pli vasta ekstera prezentiĝo de la asocio. Ni ĝojas, ke li tamen ankoraŭ restas en la estraro kaj plenumas plurajn taskojn kiel respondeculo pri *Juna amiko, kurso e125*, retejoj kaj rilatoj kun UEA.

ILEI do bezonas novan prezidanton, kiun la komitato elektos en la kunsidoj dum la ĉi-jara konferenco en Herzberg am Harz inter 12a kaj 18a de julio. Laŭ la statuto de ILEI, manke de prezidanto la estraranoj dividas la taskojn inter si. Mi, Zsófia KÓRÓDY, kiel vicprezidanto aŭtomate transprenis taskojn de prezidanto kaj laboros kiel 'aganta prezidanto' ĝis julio 2013, sed ne kandidatiĝas por fariĝi prezidanto. Ekstis diskuto ene de la estraro kaj komitato, ĉu eblus elekti prezidanton per reta voĉdonado, sed tion la regularo ne permesas. La Elekta Komisiono meritas laŭdojn, ĉar ĝi faris gravan laboron serĉante novajn kandidatojn por prezida rolo. Intertempe alvenis kandidatiĝo de Mireille GROSJEAN kaj ankaŭ Radojica PETROVIĆ esprimis sian konsenton transpreni prezidantan rolon, sed ĝis la komitat-kunsido, eĉ surloke eblas ankoraŭ starigi proponojn aŭ sin anonci. Gravus, ke la komitato ricevu biografiojn kaj aspirojn de ĉiu kandidato por la prezida posteno. Kaj gravus, ke ĉeestu la komitatkunsidon sufiĉa nombro de komitatanoj por havi kvorumon. Ni alvokas la landajn sekciojn de ILEI, ke ili zorgu pri anstataŭado, se iliaj komitatanoj ne povos fizike ĉeesti la kunsidojn. Bonvolu atenti, ke la koncernen formularon devas subskribi kaj la komitatano kaj la anstataŭanto, krome estas bezonata la aproba subskribo de la sekciestro. La pretan dokumenton kun la originalaj subskriboj oni devas fizike prezenti antaŭ la komitatkunsido. La nuna estraro estas naŭkapa, kiu estas la maksimuma nombro laŭ la statuto. Kaj Stefan MACGILL kaj Zsófia KÓRÓDY esprimis sian pretecon forlasi la estraron kaj fariĝi

komisiitoj pri sia agadkampo, se per apero de nova prezidanto-kandidato ekster la nuna estraro la nombro de estraranoj altiĝos al dek. En tiu kazo la komitato devas ankaŭ elekti novan vicprezidanton.

Mi elkore dankas al Stefan MACGILL, kiu per konsiloj kaj transdono de laŭmonata taskolisto helpas al mi plenumi la prezidantecon, kaj same multan dankon al la gekolegoj en la estraro, kiuj dividas la farenadojn. Mi promesas fari ĉion eblan en la sekvaj kelkaj monatoj por certigi la senĝenan daŭrigon de la laboro de la estraro kaj esperas havi sufiĉan forton kaj tempon por la duobla rolo kiel aganta prezidanto kaj prezidanto de LKK de la 46a ILEI-konferenco. Mi invitas vin ĉiujn partopreni, ĝui la riĉan programon kaj la gastamon de Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo.

*Kun multaj salutoj,
Zsófia KÓRÓDY, aganta prezidanto de ILEI*

BEK-Kurso kaj la tradicia Cseh-Kurso: Du malsamaj aliroj rilate la instruadon de la A- kaj O-finaĵo-sistemoj

de Dennis Edward KEEFE (Universitato de Nankino, Ĉinujo)

En la lasta numero de *Internacia Pedagogia Revuo* mi skribis pri la Cseh-Kurso (ĈEK) kaj la BEK-Kurso (BEK), listigante kaj priskribante plurajn fundamentajn diferencojn inter la du instrusistemoj. Ekzemple, la BEK-kurso daŭras kvaroble pli longe ol ĈEK; BEK estas multmetoda kurso dum ĈEK estas nur rektmetoda; BEK estas lernanto-centra, dum ĈEK estas instruisto-centra; BEK celas ne nur la paroladon, sed ankaŭ la legadon de literaturo en E-o kaj la kapablon sendepende ekutiligi PIV ktp. Mi konkludis, ke kvankam neprofesiaj instruistoj ofte asertas, ke BEK kaj ĈEK estas similaj kursoj, tiuj kursoj estas tiel malsimilaj kiel karbo kaj kotono, ŝafoj kaj ŝipoj.



En ĉi tiu artikolo, mi volas daŭrigi mian prikomentadon rilate BEK kaj ĈEK, kaj ĉi-foje mi eniros en la detalojn de la kursoj mem, komparante la instruadon de la finaĵoj de la A-vortoj kaj O-vortoj de E-o. Tiuj finaĵoj vidiĝas en la sekva listo de ok vortoj: *bona, bonaj, bonan, bonajn, libro,*

libroj, libron, librojn. Entute estas ok tiaj finaĵoj, nome, -A, -AJ, -AN, -AJN, -O, -OJ, -ON kaj -OJN.

La bona eklerno, la bona praktikado kaj la bona memstara utiligado de tiuj ok finaĵoj estas pli grava ol oni kutime supozas, ĉar, logike, se la lernanto ne bone scipovas tiun sistemon de finaĵoj, eĉ simpla ĉiutaga interparolado ne eblas. La ĉiutaga parolado bezonas verbojn, ĉiajn verbojn, kaj tiuj verboj postulas la bonan, ni diru seneraran utiligadon de la A- kaj O-finaĵo-sistemo. Prikonsideru la sekvajn, ege simplajn, ekzemplodonajn demandojn: *Ĉu vi legis la novAJN artikoloJN en Libera FoliO? Ĉu viA kursO de EsperantO estas bonA kaj interesA? Ĉu vi ŝatas varmAN teON, aŭ malvarmAN?* En tiuj tri malkompleksaj frazoj, el 24 vortoj jam troviĝas 11 finaĵoj -O kaj -A, kaj kvin el ili postulas la akuzativan formon. Tiuj finaĵoj abundas kaj gravas.

Por studi la instruadon de la finaĵoj, estas granda avantaĝo utiligi kaj BEK kaj ĈEK, ĉar ambaŭ kursoj ege klare indikas, kiam tiuj gramatikaj konceptoj ekinstruiĝas kaj kiel ili praktikiĝas. Tiu klara prezentado faciligas la komparon de la du lernsistemoj kaj helpas al ni pli bone kompreni, el kio konsistas tiuj du malsamaj aliroj por la instruado de E-o.

Por fari mian interkomparadon mi utiligis la libron *Baza Cseh-Kurso*, la sepan eldonon reviziitan, eldonitan de Internacia E-Instituto en la jaro 1987 [*surfote: Andreo Cseh*].

Por BEK, mi ĉerpas la materialon el la retejo www.bekkurso.info.

En ambaŭ instrusistemoj, ĉiuj lernotaĵoj estas zorge dividitaj en lernopaŝoj. En BEK, la kerna BEK (ĉar la BEK-ekzercaro estas nur parto de la tuto) estas 147 paĝoj da gramatika materialo, kaj 98 lecionoj aŭ lernopaŝoj. En ĈEK aliflanke, estas 166 paĝoj (19 pli ol en BEK) kaj 264 punktoj aŭ lernopaŝoj (117 pli ol en BEK).

Lernopaŝoj, do lecionoj en BEK kaj punktoj en ĈEK, estas similaj en ambaŭ kursoj. Ĉiu paŝo enhavas novajn gramatikaĵojn aŭ aliajn lernotaĵojn. Tamen la du kursoj malsimilas en tio, ke BEK ofte kunigas plurajn lernopaŝojn en la sama leciono, dum ĈEK prezentas nur unu gramatikan paŝon. Ekzemple, en lernopaŝo 1 de BEK estas, interalie, la ok personaj



pronomoj: *mi, vi, li, ŝi, ĝi, ni, vi* kaj *ili*. Tiu ununura lernopaŝo en BEK iĝas kvar paŝoj en ĈEK. En ĈEK lernopaŝo 3 instruas: *mi vi*; lernopaŝo 10: *li, ŝi*; lernopaŝo 12: *ĝi*; kaj finfine, lernopaŝo 28: *ni, ili*.

Tiaj prezentadoj, densa de BEK, maldensa de ĈEK, de lernomaterialo estas fundamenta diferenco inter la du instrusistemoj, kaj mi volas doni aliajn ekzemplojn por pli klare montri tion. En BEK ses lokaj nocioj (*super, sur, sub, dekstre de, maldekstre de, kaj inter*) estas instruataj en unu lernopaŝo, dum en ĈEK ili etendiĝas sur kvin lernopaŝoj: 22 (*sur*), 65 (*sub*), 99 (*inter*), 107 (*dekstra, maldekstra*), 195 (*super*). Nun ni komencas vidi, ke ĝenerala, organiza principo de ĈEK estas la limigo de nur unu kerna koncepto ĉe ĉiu paŝo, dum en BEK estas pli ol unu ĉiupaŝe. Tiaj samaj diferencoj, plurkoncepto-instruado en BEK, kaj unukoncepto-instruado en ĈEK ekzistas ankaŭ por la A- kaj O-finaĵoj, la ĉeftemo de mia artikolo ĉi tie. Ni memoru, ke estas ok el tiaj finaĵoj. En BEK la tuto estas instruata en nur kvar lernopaŝoj, dum en ĈEK ili estas prezentataj en sep paŝoj. En BEK ili instruiĝas inter lernopaŝoj 2 kaj 13, dum en ĈEK, inter paŝoj 4 kaj 47.

Mi poste parolos pri la konsekvencoj, laŭ mi, de la malsimilaj prezentadotempoj de BEK, relative mallonga, kaj de ĈEK, relative longa. Nun ni rigardu la ordon de la instruadoj de la A- kaj O-finaĵoj, kaj ankaŭ kelkajn ekzemplojn kiujn BEK kaj ĈEK utiligas por la instruado. La ekzemploj montros alian fundamentan diferencon inter la du instrusistemoj.

Finaĵo -O. Koncerne la sistemon de la ok finaĵoj, ambaŭ instrusistemoj lernigas, unue, la finaĵon -O, BEK ĉe la 2a lernopaŝo kaj ĈEK ĉe la 4a. En BEK troviĝas la nomoj de Eŭropaj landoj kaj urboj kiel *HispaniO* kaj *MadridO*, *FranciO* kaj *ParizO* ktp. ĈEK, aliflanke, utiligas la profesiojn kiel *instruistO* kaj *lernantO* (ankaŭ en la BEK leciono), kaj *oficistO*, *inĝenierO*, *direktorO*, *redaktorO* ktp. Utiligi la profesiojn estas bona ideo de ĈEK. Ĝi estas facila kaj rekte rilatas al la gelernantoj. Utiligi la landojn kaj urbojn, aliflanke, estas iom pli malfacila, ĉar kiel konate, kelkaj esperantistoj preferas la formojn kiel *Hispanujo*, *Francujo* ktp. Krome, la lando kaj urbo-nomado ne tiom rekte rilatas al la gelernantoj. Tamen, BEK funkcias spite al tiaj problemoj. Per detala analizo de partoj de iu kurso aŭ kursaro, ni ne tro konkludu pri la tuteca pedagogia efiko. Tio kio gravas estas la fina atingo kaj la longdaŭra rezulto de la instrusistemo, ĉu ne?

Finaĵoj -A, -AJ kaj -OJ. BEK elektas instrui la finaĵon -OJ ĉe lernopaŝo 8 kaj la finaĵojn -A kaj -AJ ĉe paŝo 11 dum ĈEK utiligas -A ĉe paŝo 16, -OJ

ĉe paŝo 27 kaj -AJ ĉe paŝo 29. Mi pensas, ke ambaŭ aliroj estas pedagogie pravigeblaj. Se la konceptoj estas instruataj en mallonga tempoperiodo, ne tiom gravas, ĉu tiu aŭ alia koncepto alvenas unue aŭ alvenas poste. Maloportunas nur se la verkisto de lernosistemo misordigas la konceptojn. Ekzemple, instruante KIA antaŭ la adjektivoj kiel *blua, granda, bona*, aŭ KIOM DA antaŭ la numeroj kiel *unu, du, tri*, KION VI PENSAS PRI antaŭ manieroj esprimi pensojn kiel *Mi pensas, ke... Mi opinias, ke... Mi kredas, ke...* kaj similajn, oni misordigas la konceptojn.

Finaĵoj -AN, -ON, -AJN kaj -OJN. BEK prezentas ĉiujn akuzativajn formojn de la finaĵoj en unu lernopaŝo, numero 13. ĈEK, aliflanke, utiligas tri lernopaŝojn, numerojn 40, 46 kaj 47. La aliro de ĈEK por la akuzativa formo, parenteze, estas interesa kaj fama. Mi rakontu la anekdoton, kiu troviĝas en la gvidlibro de Cseh: estas ĝuste ĉe ĉi tiu lernopaŝo, kie Andreo Cseh decidis enkonduki la vorton *amas*. Li rakontas, ke li decidis ekuzi tiun vorton post kiam iu fraŭlino de lia kurso ne plu ĉeestis post la tria leciono, ĉar la kurso estis enuiga kaj nur utiligis vortojn, kiuj ne estis “interesaj.” Laŭ Cseh, la interesa vorto verŝajne estis „*amas*”, kaj post tiu momento, li utiligis ĝin por instrui la akuzativon, do la finaĵo -ON en la lernopaŝo 40. *La komercisto amas la oficistinon.*

Post tiu prezentado de la instruado de la A- kaj O-sistemoj, nun iel tabelo-resume, ni komparu la prezentadon de la -A kaj O-finaĵoj en BEK kaj ĈEK.

| Finaĵoj | BEK | ĈEK |
|---------|---------|---------|
| | ĉe paŝo | ĉe paŝo |
| -O | 2 | 4 |
| -OJ | 8 | 27 |
| -A | 11 | 16 |
| -AJ | 11 | 29 |
| -AN | 13 | 46 |
| -ON | 13 | 40 |
| -AJN | 13 | 47 |
| -OJN | 13 | 47 |

En ĉi tiu tabelo pli klare videblas, ke la instruado de la finaĵoj en BEK multe pli koncentriĝas ol en ĈEK. BEK utiligas nur 13 lernopaŝojn, dum ĈEK uzas 47. Krome, en BEK, 6 el 8 de la finaĵoj instruiĝas en nur du lecionoj (lernopaŝoj 11 kaj 13). Laŭ studhoroj la tuta instruado kaj praktikado de la finaĵoj por BEK, en eŭropaj kursoj, estas eble 4 horoj, dum la tempo por ĈEK prenas eble 12 horojn.

Pro la koncentriĝo de la instruado de la finaĵoj en BEK mi konkludas, ke **ESTAS MULTE PLI FACILE AL LA BEK-KURSGVIDANTO** prepari siajn lecionojn kaj paroli kun la gelernantoj, starigante demandojn spontane. Kial? Ĉar la kerno de iu ajn kurso, rekta aŭ alia, estas verboj. Se la lernanto ankoraŭ ne havas la **KOMPLETAN** sistemon de finaĵoj en sia memoro (-A, -AJ, -AN, -AJN, -O, -OJ, -ON kaj -OJN), la instruisto devas tre tre zorge, kaj mi dirus *tro* zorge, pensadi pri la elekto de verboj en eĉ tre simplaj kazoj. Ekzemple, se la instruisto volas demandi: *Ĉu vi havas biciklon? Ĉu via amiko havas gefilojn? Ĉu vi ŝatas ruĝan vinon aŭ blankan vinon? Ĉu vi kutime legas fikciajn librojn aŭ nefikciajn librojn?* En tiuj kvar simplaj demandoj, la respondoj jam devus utiligi la tutan finaĵan sistemon: -A, -AJ, -AN, -AJN, -O, -OJ, -ON kaj -OJN. En la BEK-Kurso, la kursgvidanto bezonas scii nur, ke la gelernantoj jam finis lernopaŝon 13. En ĈEK oni devas scii ĝuste, kie la lernantoj troviĝis en la iel komplika, iom longa gramatika paŝaro.

ĈEK, tamen, havas siajn avantaĝojn. La limigo de la gramatikaj lernopaŝoj al nur unu finaĵo vaste simpligas la eklernadon de ĉiu koncepto. Teorie, ĈEK similas al la eduko-filozofio de la Harvarda profesoro pri psikologio B. F. Skinner, kies teorioj pri lernado influis lingvo-instruadon en la 50aj kaj 60aj jaroj en Usono. Skinner, kiu proponis lernadon per programitaj maŝinoj, zorge dividis la lerno-ŝtuparon en ege malgrandajn ŝtupojn, por ke la lernanto ĉiam sukcesu. Tion mi vidas ankaŭ en ĈEK.

BEK, aliflanke, kiel baza filozofio, neniam maksimume simpligas la lernopaŝojn. Je ĉiu lernopaŝo estas ofte pluraj elektoj de gramatikaĵoj. La lernanto neniam povas respondi pensante nur pri unu lernitaĵo. Li aŭ ŝi devas elekti inter du, tri aŭ eĉ pliaj. En ĈEK, kutime estas nur unu nova elekto pri gramatikaĵoj. Tro simpla, laŭ mi, sed certe ekzistas situacioj, en kiuj la simpligo de lernomaterialo povas helpi al la gelernantoj.

Se BEK estus rektmetoda, parola lernosistemo – kaj ĝi emfaze ne estas tia, ankaŭ ĝi alstrebus tian simpligon, bazan trajton de ĈEK pro neceso. Sed

memoru antaŭ ĉio, ke BEK ne estas rektmetoda sistemo. Ĝi baziĝas sur skribaj demandoj, sur videbla ekzercaro, sur gruplaboro sendepende de la kursgvidanto. Krome, en la ĉiutagaj hejmtaskoj, ĉiam estas la devigo lerni la vortojn de la sekvaj dek paĝoj antaŭ ol ĉeesti la sekvan lecionon. Tiu parto de BEK utiligas la tradukan metodon, tamen, tradukado de vortoj, ne de gramatikaĵoj nek frazoj.

Por konkludi, mi ĉiam rekomendas trarigardon kaj eĉ profundan studon de la tradicia ĈEK. Mi konas neniun alian kursomaterialon tiel bone kaj tiel zorge kolektitan kaj aranĝitan. Tamen, en ĈEK ni ankaŭ vidas kelkajn el la teoriaj kaj praktikaj limoj de ĉiaj rektmetodaj kursoj. Tro da malgrandaj lernopaŝoj, dise etendataj sur horoj, tagoj, semajnoj kaj eĉ monatoj, multe malfaciligas la instruon taskon de la kursgvidanto.

Mi esperas, ke mia komparado de BEK kaj ĈEK helpas al vi, kara instruisto, eble komenci koncepti la instruadon de E-o per pluraj, aliaj vidpunktoj. Mi atendas viajn komentojn kaj kritikojn, ĉar mi ankaŭ bezonas pliajn kaj novajn vidpunktojn kaj eble ĝuste la viaj helpas al mi.

Kiel prelegi pri Esperanto?

de *Miropiro (Miroslav HRUŠKA)*, Ĉeĥio



Kiel prelegi pri E-o? Aŭ alie dirite: kiel prezenti al publiko E-on? Relative facila demando, malfacila tamen estas la respondo. Miaopinie, ne ekzistas iu ĝenerala koncepto, ĉar ĉio dependas de tio, al kiu vi volas prezenti E-on. Tamen, tiu ĉi teksto estas celita kiel kontribuo al diskuto pri prezentado, ĉar sen bona prezentado oni ne povas atingi intereson de homoj por lerni E-on.

Miaj spertoj ĉefe devenas de prelegoj por junuloj. Bone, iam mi mallonge prezentas E-on ankaŭ al homoj pli aĝaj ol mi (kutime dum iu diskuto pri ŝatokupoj), iam mi mencias E-on dirante al iu persono mian retroŝtan adreson, kiu ekzistas en la retejo „esperanto.cz” kaj se homoj ne komprenas, kiun adreson mi diras al ili, mi ripetas la vorton kaj aldonas, ke temas pri internacia lingvo.

Sed ni revenu al spertoj pri prelegado por junuloj. Mia unua iom pli serioza prelego estis en la aŭtuno 2008 en mia mezlernejo. Tiam mi preparis komputilan prezentaĵon. Ĉar mi sciis, ke mi plej verŝajne povos uzi du preskaŭ tutajn instruhorojn (ambaŭ po 45 minutoj), mi povis komenci kaj fini mian prezentadon per filmo „Esperanto estas...” (fakte, tiam ekzistis nur du partoj de la filmo, kiuj laŭ mia opinio por tiu ĉi okazo taŭgis, ĉar ĉefe en tiu dua filmo oni pli bone povas aŭdi la lingvon).

Mia komputila prezentaĵo konsistis el la jenaj partoj: Unue mi mallonge respondis al la baza demando „Kio ĝi estas?”, poste mi priskribis skize la aŭtoron de E-o, do Zamenhofon, ke oni havu imagon pri tio, kial li kreis E-on. Kiel tria parto sekvis mallonga historio de E-o (per kio mi klarigis, ke estis jam ŝanco, ke E-o estu akceptita kaj uzata en Eŭropo). Poste mi montris skize la gramatikon de E-o kun kelkaj facilaj ekzemploj (sistemo de substantivoj, adjektivoj, verboj, pronomoj, pluralo kaj akuzativo). La sekcion pri gramatiko mi finis per klarigado, kiel en E-o eblas krei novajn vortojn (kun komparo kun la sistemo de la konata konstrua ludo LEGO kaj la prezentado de la kreado de mia ŝatata vorto „preĝejemetulo”).

Post tiu ĉi eble iom enuiga parto de prezentado, mi komencis prelegi pri jenaj temoj: kulturo (do literaturo, filmoj, muziko, ĉiam kun iu praktika ekzemplo, en la kazo de muziko oni povis aŭskulti Pafklikon). La lasta parto de mia prezentaĵo temis pri renkontiĝoj, ebloj trovi novajn amikojn, havi fascinajn rememorojn kaj spertojn, vojaĝi tra la mondo. Kaj ankoraŭ antaŭ la fino kelkaj notoj pri la uzado de E-o en interreto (ĉi tie mi mencias, ke Facebook ekzistas ankaŭ en E-o, kaj tie estas granda E-a komunumo).

Tiun ĉi komputilan prezentaĵon mi prezentis entute jam sepfoje kaj kompreneble, malgraŭ tio, ke la prezentaĵo komputila funkcias bone, mi iam ĝin ĝisdatigas (ĉefe landojn, kiujn mi vizitis per E-o). Kaj kompreneble, ne indas dum printempo prezenti al aŭskultantoj kristnaskajn kantojn en E-o. Kaj ne ĉiam mi povas kun mi kunporti multajn librojn aŭ DVD-ojn, do mi tamen decidas, kion kunporti – pro tio ĉiu prelego estas iom alia.

La lastan prelegon pri E-o mi havis en oktobro 2012. Tiam mi iel kalkulis pri tio, ke mi ne havos tempon prelegi tre longe kaj certe mi ne povos prezenti parton de la filmo „Esperanto estas...”

Do, la komputilan prezentaĵon mi iom mallongigis antaŭ forveturo al la bazlernejo, kie mi planis prelegi. Tio signifis, ke mi kelkajn bildojn de miaj

vojaĝoj forigis kaj anstataŭigis per aliaj bildoj, sed jam en malpli granda kvanto. Per bildoj mi ĉefe volis montri, ke mi danke al E-o povis viziti iom ne kutimajn lokojn kaj ankaŭ, ke tiuj estas allogaj.

En mia kazo tio estis foto antaŭ forveturo de Frankfurt am Main per TGV-trajno, foto de mia vizito en Jalto kaj foto de vizito en Ĉernobilo. La serio de tiuj tri fotoj certe vekis intereson de ĉiuj aŭskultantoj, do mia konkludo estas (almenaŭ por kazoj, ke vi volas prelegi al junuloj): prelego pri E-o ne rajtas esti enuiga – ĝi devas montri ion novan, malkutiman! Tio povas ĉefe esti fotoj de viaj vojaĝoj, sed ne forgesu ankaŭ komuniki kun viaj aŭskultantoj – vi povas peti ilin, ke ili mem provu diveni vortojn surbaze de iu antaŭa facila kaj klara ekzemplo.

Aktivigi aŭskultantojn laŭ mi ankaŭ eblas tiel, ke vi disdonos portempe al ili iun E-an libron aŭ kodiskon de iu E-a muzik-grupo. Se tio eblas finance por via E-organizo, kunportu al viaj aŭskultantoj iujn materialojn, kiujn oni povas preni hejmen (tio ne nepre devas esti DVD-oj „Esperanto elektronike”, kiuj tamen estas sufiĉe malmultekostaj), tio povas esti flugfolioj kun skiza gramatiko (tamen pli detala ol tiu, kiun vi mem prezentos en via prelego) kaj ligiloj al plej gravaj retejoj aŭ kontaktoj en via lando aŭ kalendaroj kun ligiloj al lernu.net!). Se vi ne povas doni al ĉiuj aŭskultantoj iun donaceton, pripensu preni iun donacon almenaŭ al tiu homo, kiu unue prezentos vin (en mia kazo tiu estas kutime instruistino en lernejo) kaj poste lasos vin prelegi. Kiel donacon mi povas rekomendi ĝuste la DVD-on „Esperanto estas...” aŭ „Esperanto elektronike” aŭ broŝuron „Malkovru Esperanton”, se vi posedas oficialan printitan version (en mia kazo ĉeĥa versio ekzistas).

Donaco ne nur ĝojigas, sed ankaŭ kreas pri vi bonan referencon. Tiu ĉi strategio – havi por interesiĝantoj iujn donacetojn senpagajn cetere uzas multaj kompanioj dum foiroj: ili fordonacas skribilojn, vizitkartojn, broŝurojn pri kompanio aŭ regiono se ili dum foiroj celas prezenti regionojn – do ĝi povas (devus) esti aplikita ankaŭ dum prezentado de E-o.

Sed, kiel mi diris en la komenco de tiu ĉi teksto, tiuj ĉi spertoj ne validas ĝenerale. Dependas multe de vi, de via kreemo (do se via E-organizo ne povas vin finance subteni kaj doni al vi iujn verajn E-ajn propagandajn materialojn – elpensu kaj kreu iun propran). Vi ne nepre devas uzi komputilon kaj datenprojekciilo, iam tiuj kondiĉoj ne estas (kaj ĉefe en

kazo, ke vi havas iun malgrandan komputilon, vi nepre devas uzi datenprojekciilon), vi povas elpensi ion sen komputilo.

Tamen, mi persone ŝatas uzi la eblojn de komputilo kun datenprojekciilo. Pri tio indas ĉiukaze interkonsenti antaŭ via prelego en lernejo. Ili sciu, kion vi bezonas por ke ne okazu poste, ke nur surloke vi ekscios, ke vi ne havas eblon uzi lernejan datenprojekciilon. Plej verŝajne vi ne havos vian propran, ĉar tiu ĉi „ludilo” iom kostas. Tamen per ĝi eblus montri iujn amuzajn videojn, montri iujn ttt-paĝojn. Tion verŝajne ne atendas homoj en aĝo de ĉirkaŭ 70 jaroj, kiuj ne uzas komputilojn kaj jam ne tiom vojaĝas.

Do, ĝenerala koncepto por ĉiuj aĝo-grupoj estas laŭ mi jena: la prelego devas nepre montri ion interesan por homoj, kiuj aŭskultos vin, do montru al ili la praktikan uzeblecon de E-o. Ne forgesu ankaŭ indiki aŭ diri viajn kontaktinformojn (kaj ankaŭ retejon por pliaj informoj, en mia kazo tio estis ligiloj al <http://www.esperanto.cz> kaj ligilo al la paĝo de Ĉeĥa E-Junularo <http://mladez.esperanto.cz>). La ligiloj devas esti laŭeble facile memoreblaj aŭ rapide transskribeblaj (do ne uzu tro komplikajn retpoŝt-adresojn). Ne forgesu vin prezenti: kiu vi estas, de kie vi venas kaj kion vi celas prezenti. Kiam mi lastatempe en oktobro 2012 komencis mian prelegon, mi klarigis, ke E-o iĝis mia grava hobio (ne tute ĉefa, ĉar mi krome interesiĝas pri publika transporto kaj parte ankaŭ pri komputiloj) kaj hodiaŭ ĝi estas grava parto de mia vivo. Kaj mi aldonis, ke mi komencis ĝin lerni en la sama aĝo en kiu ili nun estas (14 jaroj) kaj ke E-o donis al mi multajn interesajn spertojn dum mia adolesko.

Necesas ankaŭ kalkuli pri tio, ke ne ĉiam vi havos tempan lukson por ke vi povu prezenti ĉion, kion vi eble volus prezenti – en mia kazo du instruhoroj estis tempo de seminario de la angla lingvo, kaj la instruistino donis al mi la tutan tempon (kun 10-minuta paŭzo), sed kutime vi havos 30-45 minutojn kaj poste vi devas ankaŭ rezervi iom da tempo por respondado al demandoj.

Kaj se mi jam mencias tempon, ne forgesu provi antaŭ via unua prezentado prezenti vian prelegon relative malrapide kaj trankvile al vi mem (aŭ al via amiko), por ke vi sciu, kiel longe vi parolas kaj komentas ĉion, kion vi skribis en la komputila prezentaĵo kaj kiom da tempo vi bezonas por prezentado de iuj aldonaj (muziko, libroj ktp).

Interesaj povas esti ankaŭ eĥoj de via prelego – do, se vi prelegas en lernejo, ne forgesu poste peti la instruiston, kiu ĉeestis kune kun la lernantoj vian prelegon, pri eĥoj kaj reagoj. Tiujn eĥojn vi povas poste uzi en la estonteco kiel referencoj por prezentado de ideo, en la kazo ke vi prelegos pri E-o en iu alia lernejo.

Tio ĉi estas la fino de mia teksto. Kiuj estas viaj opinioj? Mi atendas viajn reagojn – skribu al: miropiro@esperanto.cz.

Mia saĝo post 50 jaroj de instruado de E-o

de Zlatko TIŠLJAR, (Slovenio, ztisljar@gmail.com)



Mi instruis E-on en pli ol 200 kursoj ekde mia 17-a jaraĝo, do nun estas 50 jaroj. Mi instruis en mallongaj kelktagaj kursoj, plej ofte en kelkmonataj kursoj kaj foje eĉ en 3-jaraj kursoj. Mi instruis al infanoj, kiuj ankoraŭ ne sciis skribi, al homoj de ĉiuj aĝoj kaj profesioj ĝis maljunuloj, al intelektuloj kaj al la plej malbonaj gelernantoj en lernejoj, al homoj el deko da landoj eŭropaj. Mi ĉefe instruis la plej bazan kurson

(A) kaj malpli ofte ankaŭ la pli superan kurson (B).

Mi kredas, ke tian vastan rilaton al ĉiuspecaj celgrupoj kaj al ĉiuspecaj lernmetodoj kun variaj daŭroj de la kursoj eble havas neniu alia. Do, mi rajtas nun resumi, kion mi lernis pri homa kapablo lerni fremdajn lingvojn, aparte E-on. Krome, mi konstatis, ke granda plimulto de la instruistoj instruas ne por havi sukceson ĉe la lernantoj, sed por ricevi salajron kaj agi laŭ la preskribitaj lernprogramoj. Tion mi neniam faris. Mia centra motivo ĉiam estis klopodi atingi rezulton ĉe plimulto de la kurspartoprenantoj kaj adapti mian laboron al tiu celo kaj metode kaj tempe.

La centra kaŭzo por sukceso en pedagogiaj klopodoj estas la motivo de la lernanto. Se lernanto ne havas motivon kaj rezistas akiri ĝin, la rezulto estos nula. Oni povas atingi tre minimumajn rezultojn per ekstrema perforto, sed seriozajn kvalitatajn rezultojn neniam.

La motivoj povas esti naturaj (ĉefe deziro ludi kaj lude ekscii, kaj aparta ene de tio estas la motivo kaŭzita de rapida lern sukceso, do de metodo, kiu donas tujan kaj palpeblan novkapablon kaj komprenon) aŭ provokitaj motivoj (ĉefe stimuli al pliprofundigo de scioj, kiujn la infano pro iu ajn kaŭzo pli bone lernis en frua aĝo, aŭ instigi okupiĝi pri aferoj, kiuj rilatas al idealoj de unuopulo).

Mi instruis E-on al homoj sen motivoj (infanoj en elementaj lernejoj, kiuj venis al la kurso pro tio, ĉar instruistoj de aliaj lernobjektoj promesis ion al ili, se ili lernos E-on samkiel al gejunuloj elpelitaj el regula lernejo pro malsocia konduto aŭ absoluta malkapablo). En tiuj kazoj mi ĉefe okupiĝis pri tio kiel ludigi ilin kaj forigi la konscion, ke ili ion lernas. En tiaj cirkonstancoj mi havis minimumajn sukcesojn, plej ofte preskaŭ neniajn, sed almenaŭ mi sukcesis atingi ilian pozitivan rilaton al E-o. Tamen el 8 generacioj kun entute kvindek da gejunuloj el la kategorio de plenaj lernfuŝuloj mi sukcesis atingi, ke 2 lernis vere la lingvon kaj uzas ĝin kaj pluraj el ili (eble 5) pro E-aj vojaĝoj, kiujn mi organizis por ili, ŝanĝis la rilaton al la lernado mem kaj iĝis bonkvalitaj studentoj kun tre pozitiva opinio pri E-o.

Mi instruis al gimnazianoj kun bonegaj konoj de aliaj lingvoj, kiuj havis esceptajn kapablojn rapide lerni kaj en tre rapidaj kursoj (de tri ĝis 10 tagoj) ofte granda plimulto kapablis tre bone esprimi sin skribe kaj kelkaj esceptuloj eĉ tre bone povis paroli post eĉ nur tri tagoj. Ĉi tie temis pri homoj kun esceptaj antaŭscioj, kiuj ebligis rapidan sukceson kaj tio per si mem iĝis motivo. Tamen, tiaj estis malmultaj. Verŝajne inter plurcento da gimnazianoj, kiujn mi instruis, nur dudeko el ili vere iĝis bonaj esperantistoj.

En ĉiuj aliaj kursoj la centran rolon pri sukceso havis la maniero adaptiĝi al la diversaj kapabloj kaj antaŭkonoj de la lernantoj. Pli aĝaj homoj kutime sufiĉe pli malrapide komprenas kaj bezonas esence pli da tempo por povi bone memori kaj eĉ pli por povi bone kombini diversajn vortojn kun diversaj gramatikaj reguloj kaj do krei frazojn. La samo valoras ankaŭ por gejunuloj, kiuj ne havas grandajn lingvajn antaŭkonojn kaj ĝenerale ne estis tre sukcesaj en lerneja lernado. En tiaj kursoj tre gravis la maniero, laŭ kiu estis distribuata la lernmaterialo kaj laŭ kiu mi kiel instruisto sukcesis taksii la necesan tempon por diversaj ekzercoj tiel, ke ili estu allogaj, ke la

plimulto bone komprenu ilin kaj havu sufiĉan tempon por ekzerci, kaj tamen ne igu la kurson teda al tiuj, kiuj kapablis lerni pli rapide.

La esenco de ĉiu sukceso en pedagogio estas prizorgi, ke la plej bazan scion, kiu estas fundamento de iu lernobjekto, oni instruu tiom longe kaj ekzercadu tiom longe ĝis la instruisto certas, ke ĉiuj lernantoj aŭ almenaŭ granda plimulto vere komprenas la fundamenton kaj kapablas ĝin uzi. Tio signifas, ke ne gravas la tempo preskribita laŭ la lerneja programo (antaŭviditaj instruhoroj), sed tiu tempo kiu estas tre individua de grupo al grupo, tiu kiun opinias la instruisto sufiĉa kaj kutime temas pri multe pli longa tempo ol antaŭvidita en la lernprogramoj. Sed kiam la gelernantoj vere komprenas kaj kapablas uzi la fundamenton, poste ili lernos pliajn nivelojn multe pli efike kaj rapide. De tio dependas, ĉu oni parolos poste en la vivo: „Ho jes, mi memoras, mi havis tre bonan instruiston” aŭ „iun ege malbonan, de kiu mi lernis nenion”.

Kio estas la baza fundamento de fremda lingvo? Tio estas la minimuma lingva materialo (leksika kaj gramatika), kiu kovras principe ĉirkaŭ 80% de la parola ĉiutaga korpuso laŭ la uzofteco. En naciaj lingvoj temas pri proksimume 2000 plej oftaj morfemoj kaj tiu fundamento postulas tre paciencan laboron per lernolibroj kun proksimume 50 lecionoj dum minimume 4 lernojaroj. Rilate E-on la afero estas esence alia: la fundamenton difinis mia esploro pri morfemofteco en 1979, laŭ kiu konstatiĝis, ke nur 470 plej oftaj morfemoj kovras 95 % de la parola korpuso kaj ke tiun materialon, tiun fundamenton, oni povas instrui per malgranda helplibro, en kiu la materialo estas distribuita kaj klarigita en dek aŭ 12 lecionoj.

La sukceso estos certa nur se: la instruisto vere ne instruos en la unua kurso, kies celo estas transdoni tiun fundamenton, iun ajn plian materialon – nek pliajn vortojn nek gramatikon kaj se li ekzercos tiun materialon persiste kaj malrapide tiom longe ĝis li konvinkiĝos, ke ĉiuj kapablas bone praktiki la sciojn de tiu fundamento. Tion eblas fari dum 50 horoj por tre kapablaj junaj gimnazianoj, sed necesas eĉ 300-400 horoj por nemotivitaj, maljunaj kaj homoj kun minimumaj antaŭkonoj pri fremdaj lingvoj. Kompreni ke estas tiel granda diferenco nepre necesa, se oni volas sukcesi ĉe grupoj negeniaj kaj nejunaj, estas la ĉefa malfacilaĵo por instruistoj. Ili simple ne kredas, ke iu grupo bezonas dekoblon da tempo ol alia grupo.

La instruistoj ankaŭ ne volas kompreni, ke en la unua fundamenta scio oni NE RAJTAS PLIGRANDIGI LA AMPLEKSON DE LA MATERIALO EĈ JE NUR 5%, ĉar tio esence pli malfaciligas la laboron kaj plilongigas la normalan lernotempon.

Tiusence la E-aj lernolibroj por komencantoj tute ne konsideras tiun principon, ĉar ĉiu aŭtoro opinias, ke E-o estas tiel facila per si mem, ke oni ja povas senprobleme lerni anstataŭ 470 morfemojn almenaŭ 800 aŭ 1000 (ja tio estas multe malpli ol 2000 de aliaj lingvoj). Oni ne komprenas, ke lerni unu novan vorton ne signifas pli malfaciligi la lernadon je 0,2% de la lernado (ĉar temas pri 0,2% el 500 morfemoj), sed ke tio plimalfaciligas multe pli, ĉar oni ne lernas nur unu plian novan vorton sed kapablon uzi ĝin ene de la ĝis tiam lernita gramatiko kaj kombini ĝin kun ĉiuj ĝis tiam lernitaj vortoj. Dek pliaj vortoj pli malfaciligas la lernadon je 20% de la necesa plia tempo, kaj se la grupo estas tia, ke ĝi bezonas normale 400 horojn por la tuta kurso, novaj 10 vortoj signifas por ili devi lerni pliajn 80 horojn, se oni volas, ke ili vere povu uzi tiujn novajn 10 vortojn kune kun ĉiu antaŭa materialo.

Gravas do kompreni, ke se oni atentis tiujn principojn kaj uzas instruilojn kiuj pli-malpli sekvas la rekomendojn de la Zagreb-metoda lernilo, oni atingos plej efike la rezulton tiel, ke la lernantoj scios tre bone uzi la fundamentan lingvomaterialon (470 morfemojn) kaj esprimi 95-procente ĉion, kion ili bezonas en la ĉiutaga vivo. Post tio (ĉu 50-hora kurso por tre talentaj junuloj en malgrandaj grupoj aŭ eĉ ĝis 400 horoj por tre miksitaj kaj grandaj grupoj) oni povas sen problemo sukcese daŭrigi la instruadon je pliaj niveloj laŭ kiu ajn metodo kaj lernilo.

Konklude:

Plej kutime oni ne lernas E-on pro vera motivo (pro tio, ĉar tiu scio donos la eblon profesie perlabori monon aŭ okupiĝi pri io tre alloga) kaj tiam la nura ebla motivo por komencanto estas tre rapida kaj sukcesa sciakiro, do rapida lernprogreso. Por havi tion nepras:

a) En la unua fazo lerni tre bone kaj praktike la fundamenton de 470 morfemoj kaj la kombinuzeblon de ili en kurso, en kiu okazas iom-post-ioma kresko de la plej frekvencaj ĝis ĉiam malpli frekvencaj morfemoj. Tion ebligas la ellaboro de lerniloj baze de frekvencmorfemaro de Parolata E-o kaj kiel esenca praktika rimedo uzeblas la Zagrebmetoda lernolibro.

b) Nepras kompreni, ke la lern sukceso dependas de individuaj kapabloj de la lernantoj kaj grandeco de la grupo. Tiusence oni devas scii, ke eblas teorie atingi la kapablon uzi la fundamenton post nur 50 horoj ĉe junaj kaj talentaj gejunuloj kun granda lingva antaŭscio, sed ke la samon en granda kaj tre bunta grupo aŭ ĉe tre junaj infanoj oni povas atingi nur post multe pli da horoj, ĉu duoble, trioble aŭ eble eĉ 10-oble kaj pri tio devas decidi la instruisto kaj diri al la lernantoj anticipe aŭ la grupon dispecigi je pluraj grupetoj po kelkaj lernantoj.

c) Se oni tamen ne aplikas la principon, ke al komencantoj oni vere instruas nur la bazan materialon de la fundamento, sed enmiksas en la komencan kurson pli da materialo, oni devas konscii, ke tio aŭ postulas esence pli da tempo por tiu instrumaterialo, aŭ kaŭzas malsukceson de la celo mem tiel ke la granda plimulto de gelernantoj forlasas la instruadon antaŭ la fino de la kurso.

ĉ) En la okdekaj jaroj mi faris esploron pri kiom da homoj lernas E-on en diversaj kursoj tra la mondo dum unu jaro. Ne eblis kompreneble ricevi detalajn informojn, sed baze de respondoj el dekkvino da landoj eblis konkludi, ke en la porkomencantaj kursoj ĉiujare komencas lerni en la mondo minimume 100 000 lernantoj. Kaj kiom da ili efektive sukcesas finfari la kurson? Maksimume 10-20%. Kaj kiom da ili efektive esperantistiĝas? Ne pli ol 1%. Kial en la procedo de instruado forfalas 99% de tiuj, kiuj havis la deziron lerni E-on? Ĉefe pro malatento al la principoj ĉi tie priskribitaj.

Malsama ekvilibro inter skriba lingvo kaj parola lingvo

de *Mirejo GROSJEAN* (Svislando)

En Bjalistoko, kiam Zamenhof loĝis tie, vivis diversaj etnoj. Estis poloj, katolikaj, kiuj skribis per latinaj literoj (la niaj). Estis rusoj, ortodoksoj, kiuj skribis per kirilaj literoj. Estis germanoj, protestantoj, kiuj skribis per gotikaj literoj. Estis judoj, kies religio estis judaismo, kiuj skribis per hebreaj literoj. Mi eksciis antaŭ kelkaj tagoj, ke hebreaj literoj havas nomon kaj estas simboloj. Por mi la literoj ne havas nomon, ne estas simbolo. La grekaj literoj alfa kaj omega havas simbolon de komenco kaj fino, tio

devenas el la Biblio. El tiu skribmaniero venas la vorto „alfabeto”, ĉar beta estis la dua litero post alfa.




De maldekstre: latinaj literoj, mongola skribmaniero, kirila skribmaniero

Dum entute dekunu monatoj mi restadis en Japanio, kie uzatas ideogramoj, iu instruis al mi la esprimon ideobildo... Do en Japanio mi promenas ene de nelegebla desegnaĵa arbaro... Mi sentas min kiel kvarjara infano, kiu ne kapablas legi... Stranga sento! Ideogramoj tute ne similas al literoj. Ĉiu el ili havas signifon, unu ideogramo similas al unu vorto. Infanoj dum 9 jaroj lernas 1950 el ili. Ekzistas pliaj por intelektuloj. Ene de ideogramo aŭ ideobildo aperas foje desegnoj kun signifo. Ekzemple en unu ideobildo vidiĝas arbo kaj homo, kaj ĝi signifas ripozon. Do temas pri tre simbola skribmaniero. Ĉiuj japanoj desegnas ekzakte laŭ la sama fingro"danco" la ideogramon, do vidante la dancantan manon tuj oni povas diveni, pri kiu ideogramo temas, se oni lernis ĝin. Tute male ĉe mi en Svislando, iu persono desegnas la ciferon 9 per komenco sube farante unu solan strekon, aŭ per komenco supre dekstre farante cirklon maldekstren, revenante al la komenca punkto kaj poste desegnante la voston de 9... ĉiu estas libera. Ĉu unu metodo estas pli bona ol la alia? Mi ne scias. En la lernado de E-o, japanoj ŝatas legi la vortojn, ĉar en ilia lingvo la skribmaniero donas al ili la signifon. Tion la instruisto nepre respektu. Male, en mia lando la instruistoj

parolas, ripetigas, demandas, atendas respondojn. Tia instrumaniero estas malfacila por orientazianoj. Mi volas atentigi, ke la ekvilibro inter skriba lingvo kaj parola lingvo malsamas laŭ la kulturoj. Bonvolu noti, ke ideogramoj uzatas en Ĉinio, Japanio kaj Tajvano.

Ekzistas multegaj skribmanieroj en la mondo, alfabetoj aŭ aliaj. En Afriko pluraj skribmanieroj uziĝis sed malaperis pro koloniado, ili estis detruitaj aŭ malpermesitaj. Kelkaj alfabetoj aŭ ideogramsistemoj skribiĝas de dekstre maldekstren, aliaj de maldekstre dekstren. Kelkajn lingvojn oni skribas vertikale, kiel la ideogramaj lingvoj japana, ĉina kaj tajvana.

Mi vidis la mongolan, tre belan skribmanieron, kiu similas al la araba alfabeto, tamen skribiĝas vertikale. Mongolaj samideanoj klarigis al mi, ke



iŭ pramongolo prenis la araban skribon, turnis ĝin je 90 gradoj por skribi vertikale, skribado pli komforta, kiam la skribanto sidas sur galopanta ĉevalo. Provu! Vere, la mongola skribmaniero estas tre bela eĉ sen galopado! Fine venas mia subskribo, mia nomo Mirejo; maldekstre per hiragana, silaba alfabeto japana, meze per katakana, silaba alfabeto japana (jes, ekzistas du tipoj), kaj dekstre per 3 japanaj ideogramoj elektitaj de HORI Yasuo, kiu pentris la tuton [vd la foton maldekstre].

Esperanto-belarta literaturo kiel rimedo por ekkoni la mondon

de Svetlana MIROŜNIĈENKO (Sankt-Peterburgo, Ruslando)

Dum multaj jaroj mi instruis Esperanton en lingva lernejo kaj mi povas certigi, ke lernado de tiu ĉi lingvo povas kontribui ne nur al la disvolviĝo de la scipovoj en E-o, sed ankaŭ al la akiro de scioj en multaj lernofakoj. Tio signifas, ke E-o helpas konatigi gelernantojn kun kulturaj realaĵoj de multaj landoj.

Oni multe parolas pri la grava rolo de E-o en komunikado inter popoloj, sed oni nepre devas paroli pri la influo de nia ilo sur la disvolviĝo de filologiaj



kapabloj: la larĝigo de horizontoj de junaj e-istoj de kio dependos la komunikado t.e. interkompreno. Tio eblas, ekzemple, danke al laborado per literatura teksto. Temas certe pri malsimilaj tekstoj: poemoj, kantoj, prozaĵoj. Do por disvolvi filologiajn kapablojn oni devas trovi interesajn tekstojn en E-o. Atentigu, ke la teksto konsistas el lingvaj fenomenoj kaj ankaŭ el enhavo, kiu apartenas al literaturaj fenomenoj. La laboro per la teksto ludas vere grandan rolon certe en la disvolviĝo de lingvaj konoj. Multaj gelernantoj post la lernejo volas ligi la vivon kun lernado kaj instruado de fremdaj lingvoj, kaj tiu, kiu instruas E-on, precipe en lernejo, devas enfokusigi la atenton sur komunaj kaj malkomunaj trajtoj de la instruataj lingvoj kompare kun E-o.

Sed krome oni devas atentigi pri la kulturaj realaĵoj, kiujn eblas trovi en teksto: pri iuj interesaj personoj historiaj, poetoj, verkistoj, geografiaj lokoj (urboj, riveroj, kasteloj ktp.) pri kiuj oni parolas en la teksto. La etaj lekcionoj kun prezentaĵoj sur la komputilo estas tre interesaj por la infanoj kaj evidente tre bone larĝigas ilian horizonton kaj enkondukas la gelernantojn en la fremdan kulturon.

Oni povas akiri filologiajn konojn legante literaturajn tekstojn kaj laborante per tiuj. Sed ne ĉiuj poste fariĝos filologoj. Tamen oni devas diri, ke filologiaj konoj povas esti interesaj ne nur por lingvisto kaj por historiisto, sed ankaŭ por aliaj profesiuloj, kiuj povas studi per teksto literatura la estadon, la kulturon, la tradiciojn kaj morojn de aliaj popoloj. La konoj de kulturaj realaĵoj povas doni klarigon al leganto por kompreni la tekston. Do, por kompreni la tekston oni nepre devas posedi konojn pri multaj naciaj realaĵoj, kiuj ekzistas en tiu lando, kies aŭtoro verkis la literaturajon. Oni povas konstati, ke filologio estas „servo por komprenado”. La filologio ekzistas por kompreni alian kulturon, alian nacion. Pri tio parolas la rusa filologo Averincev [1990:545].

La filologia instruado devas realiĝi tra la tuta sistemo de lernobjektoj studataj en mezlernejo, kiuj parolas pri la kulturo de popoloj. Certe la instruado de historio, de geografio, de literaturo estos fruktodona, ĉar ĝi estas praktike parolanta pri la ĝenerala kulturo kaj ni povas diri, ke filologio estas ne nur branĉo de iu instruado, sed scipovo kiu necesas por deĉifri la tekston eĉ profesie [Gindin 1998:6].

Por tiu ĉi laboro la gelernantoj devas posedi la necesan **kompetencon** de leganto. De la bonformita kompetenco dependos la kompreno de la teksto. Mi supozas, ke la metodo inkluzivas la laboron koncerne la enhavon de la literatura verko, la laboron koncerne la lingvon de la verko kaj krom tio kun kulturaj realaĵoj de la verko. Se diri mallonge, temas pri tre detala analizo, pere de kiu gelernantoj devas kompreni la tekston. Vigotskij multe parolis pri „psikologio de la arto”. Fakte verkisto parolanta pri iuj eventoj (li mem elektas pri kio li volas paroli), elektas vortojn por priskribi ion: li priskribas epizodojn kaj faras konkludojn, dialogojn kaj monologojn, li inventas rolojn kaj tiamaniere la aŭtoro ellaboras la belartan temon [Vigotskij 2000:219]. La profunda analizo helpas kompreni la temon kaj la problemon de la verko.

Se ni parolas pri instruado, la instruisto aŭ instruanto devas nepre pensi pri verkoj, per kiuj li/ŝi volas labori dum la analizo. Ni ofte laboras per tradukita literaturo, ekzemple per ĉinaj verkaĵoj (fabeloj). La fabeloj konatigas nin kun karaktertraĵoj de ĉinoj. Tio estas interesa kaj krome tio permesas fari komparon kun karaktertraĵoj de sia propra popolo. Se oni laboras per verkaĵoj de rusaj verkistoj, tiam gelernantoj konatiĝas kun rusaj realaĵoj de iu epoko. Tio dependas de la tempo, pri kiu temas la literaturaĵo ktp.. Tiamaniere oni povas labori per libroj de multaj aliaj naciaj aŭtoroj, kiuj permesas kompreni la naciajn realaĵojn.

Laŭ mi unue la elekto de studobjekto (literatura verko) kaj due la metodo helpe de kiu oni formas la kompetencon de leganto, **estas du ĉefpunktoj** gravaj por progresigi la filologiajn kapablojn de lernantoj cele ekkoni la mondon pli profunde.

Literaturo:

1. Averincev 1990: Averincev S.S. Filologia // Lingvistika enciklopedia vortaro. M., 1990.
2. Vinogradov 1963: Vinogradov V.V. Stilistika. Teoria poeziĉeskoj reĉi. Poetika. M., 1963.
3. Vigotskij 2000: Vigotskij L.S. Psikologia iskustva. SPB.: Azbuka, 2000.
4. Gindin 1998: Gindin S.I. Vvedenie v obtsuju filologiju // Avtorskie uĉebnie programi po gumanitarnim i socialno-ekonomiĉeskim disciplinam: psikologia, pedagogika, lingvistika, literaturovedenie. M.: Izd. korporacia "Logos", 1998.
5. Esin 1998: Esin A.B. Principi i priemi analiza literaturnogo proizvedenia: Uĉeb. posobie dla studentov i prepodavatelej filologiĉeskih fakultetov, uĉetelej-slovesnikov. M.: Flinta, Nauka, 1998.

Spertoj de lernejaj grupoj en Komenius-projekto GUTO

de Zsófia KÓRÓDY (Germanio/Hungario)

Gajaj dekjaruloj, ruĝetaj vizaĝoj, brilantaj okuloj, vigla babilado, laŭta ridetado – jen ĝeneralaj impresoj vide al la partoprenantaro dum la unua kunestado de Komenius projektpartneroj el Germanio, Hungario kaj Italio. Danke al la Eŭropa subvencio, kiun gajnis la tri mezlernejoj el Herzberg am Harz, Győr kaj Mazara del Vallo. La ellaborintoj de la projekto estis Zsófia KÓRÓDY kaj Ewa KUKIELKA, ambaŭ instruantaj volontule en herzbergaj lernejoj. La ideo venis el sperto de kelkbara lerneja E-instruado: la junularo pli kaj pli malmulte interesiĝas pri loka kulturo, historiaj, geografiaj valoraĵoj, kelkaj neniam vizitis famajn lokojn, muzeojn en la propra ĉirkaŭaĵo. Pro tio ni elektis la ĉeftemon por la projekto: Gvidata vizito de la loka kastelo al la 'Eŭropa Domo', laŭ la anglalingva originala titolo '*A Guided Tour from the Local Castle to the European House*', mallonge GUTO. La celo de la dujara kunlaboro estas trejni junajn ĉiĉeronojn kaj prepari ilin lingve kaj fake por gvidi eksterlandajn partnerojn en sia urbo.

La unua vizito al Mazara del Vallo estis unusemajna, plena de interesaj eventoj en la lernejo G. Grassa, vizito al la historia urbocentro, muzeoj, preĝejoj, promenado sur la marbordo, ekskursoj al Trapani, Erice kaj la temploj de Selinunte. Do, multo por vidi kaj sperti por estontaj ĉiĉeronoj.

La projekto baziĝas sur reciproka gastigado ĉe familioj, per kio la lernantoj spertas ankaŭ la ĉiutagan vivon de siaj partneroj kaj ekhavas travivaĵojn kun siaj samaĝuloj dum kunestado, lernas pri familiaj kutimoj, manĝaĵoj, vivritmo, lernas konduki kiel parto de alia familio. Estis interesa sperto aŭdi la italajn gepatrojn saluti infanojn en E-o kaj vidi en ilia mano la etan libreton *Pošamiko*, per kiu ili provis komunikadi kun siaj gastoj. Per la tut-semajna kunestado ekestis integriĝo en la novan familion, kie ĉiuj bezonoj, deziroj estis atentataj, prizorgataj kaj komenciĝis veraj amikecoj inter la diverslandaj gejunuloj. Laŭ la programo la gastigantaj lernantoj kuniris la eksterlandajn geamikojn al kelkaj lernejaj lecionoj kaj eĉ ni, akompanantaj instruistoj, povis enrigardi klasĉambrojn kaj sekvi la lecionojn ekz. pri geografio, angla lingvo, kantado ktp. Ni organizis ankaŭ apartan kunvenon por ĉiuj projektpartoprenantoj kun lingva ekzercado, konkursa teamludo.

Grandan rolon ludis en la sukcesa vizito la direktorino de la lernejo, d-rino Angela CRISTALDI, kiu bonege gvidis kaj fleksiĝeme kunorganizis la programon ne nur por la Komenius-partneroj sed ankaŭ por la samtempe ĉeestanta muzikgrupo el Bjalistoko. En la oficiala lerneja akcepto partoprenis ankaŭ la urbestro de Mazara del Vallo kaj ni havis krome la eblon renkonti plurajn instruistojn kaj interŝanĝi spertojn pri lerneja instruado en la partnerlandoj. Estis sentebla la subteno al E-o, la tre pozitiva opinio pri ĝia komunikvaloro, utilo. Ni devas danki ankaŭ al la volontuloj kaj aliaj eksterlandaj E-helpantoj, kiuj transprenis la taskon instrui la internacian lingvon en pluraj klasoj de la lernejo kaj multe laboras por la disvastigo de la lingvo en la urbo.

Rilate al E-instruado ni devas mencii, ke malgraŭ tio, ke la projekto ne celas rektan E-instruadon, en ĉiuj partnerlernejoj ekestis pli intensa lingvolernado por estonta interkompreniĝo. En ĉiuj partnergrupoj estis kaj jam spertaj E-parolantoj kaj komencantoj, kiujn helpis la tradukaĵoj en naciaj lingvoj. La lernantoj kompreneble uzis ĉiujn eblajn komunikadmanierojn inter si, tute ne ĝeniĝis pri momenta nescio de iu vorto, frazo. La tasko de ni, projektgvidantoj, E-instruistoj estos forigi la uzon de la lingvo en la estontaj renkontoj kaj labori por la promesitaj komunaj projektproduktoj: multlingva glosaro por ĉiĉeronoj, ŝablonoj por mallongaj vivsitacioj dum urborigardado, scenetoj, filmoj, albumoj. La 1-an paŝon por tio faris la germana grupo: ĝi verkis 2 etajn teatraĵojn laŭ konataj legendoj el Herzberg kaj la Harz-regiono kaj en la adiaŭa vespero prezentis ilin per akompana fona bildprojekciado. La hungara grupo kunportis projekciilan prezentadon pri hungaraj paskaj kutimoj kaj tradiciaj festoj, manĝaĵoj, ornamaĵoj. Ĉio fariĝos publikigenda materialo por la konstruata plurlingva retpaĝaro, la ĉefa kolekto por projektrezultoj, komunaj produktoj.

Estas ĝojige, ke la lernantoj aprezas la bonŝancon, kiun tiu projekto donas al ili, ja sen subvenciado tiuj vizitoj, internaciaj renkontoj, travivaĵoj dum kunestado ne povus realiĝi. Ni instigas ĉiujn niajn gekolegojn, bv. provi akiri similajn ekstermovadajn subvenciojn kaj utiligi ilin por disvastigado de E-o. Seminarion pri eŭropaj projektoj kaj subvencipetado ILEI organizis kun la tradicia pedagogia renkonto en Germanio (TORPEDO 2010), kiu instruis, kiel organizi kaj verki projekton por financado fare de Komenius-kaj Grundtvig-programoj. Ankaŭ kadre de la 46a ILEI-konferenco ni traktos la temon de internaciaj projektoj kaj prezentas rezultojn de internacia kunlaboro.

El la landoj kaj sekcioj

Ĉinio

La 7-a Esperanto-Kongreso de Nordoriento kaj Interna Mongolio de Ĉinio (EKNI) okazos inter la 16-a kaj 18-a de aŭgusto, 2013, en la Jilin-a Universitato en Changchun, Jilin, kun la temo „Penege plibonigu la Esperantan kapablon”. Ne mankos aliaj programeroj ekz. juna oratora konkurso, aŭkcio, bankedoj, interkona vespero, ekskursoj ktp.

Inf.: Wu Guojiang, Liaoning-provinca E-Asocio, adreso: Fushun Xinfu-Qu, Qianjin-Lu, 45-Hao, 113015 Fushun, Liaoning, Ĉinio, *ghemelurboj@yahoo.com.cn*.

Inter la 21-a de julio kaj 11-a de aŭgusto 2013 ILEI-CN kaj Xi'an-a Esperanto-Asocio okazigos **Internacian Someran Lernejon de Esperanto en la Monaĥejo Tiefo**, 80 km-ojn nordokcidente de Xi'an.

Programoj: kursaro pri ABC, gramatiko, vortfarado, traduko, legado kaj verkado, konversacio. Seminario pri interŝanĝo de spertoj kaj instrumentoj, sesio de esperantologio.

Kontaktadresoj: *arko.gong@qq.com* kaj *miaohui@ebudhano.cn*

Francio

Depost 2011 kunlaboras ILEI kaj la kulturcentro Grésillon per okazigo ĉiujrintempe de lingvaj kursoj sekvataj de sesio de la KER-ekzamenoj. Ni povas konstati, ke la populareco de la aranĝo konserviĝas – la kastelo tute plenas. Kursoj disvolviĝas trinivele, kun 5 studhoroj tage – 3 matene kaj 2 fruvespere. Ses komencintoj ricevas gvidon de ‘Ŝtonĉjo’ – iuj atingis jam bazan parolkapablon. La mezan nivelon prizorgas Christophe CHAZAREIN, kies dekduo da kursanoj i.a. komune planas idealan E-vilaĝon. La gvidanto de la supera nivelo venas de ILEI: Stefan MACGILL; ties 16 kursanoj trastudas la teatraĵon *La Martelo* el la libro *Nemave Edifi*. Krome ĉiu ricevis taskon pretigi ĉ. 5-minutan prezenton de iu sia hobio aŭ okupiĝo – tiuj montriĝis ekstreme variaj, fascinaj kaj diskutvekaj. La parolcentrecio gravas por konvena pretiĝo por la ekzamenoj – tiuj okazos je ĉiuj disponeblaj niveloj: B1, B2 kaj C1. Praktike ĉiuj kursanoj plus kelkaj pliaj submetiĝos al la ekzamenoj. Jen fruktodona kaj daŭrigenda kunlaboro.

Stefan MACGILL

Koreio

De la 21a ĝis la 24a de januaro 2013 okazis 'La 3-a ISOA' (ILEI-Seminario en Orienta Azio) en la urbo Iksan. En la seminario ĉeestis 41 e-istoj (El Koreio 25, Ĉinio 9, Japanio 4, Hungario 1, Novzelando 1 kaj Litovio 1) La temo de la seminario estis 'Esperanto-instruado en lernejo'.

Jen la prelegoj: La utileco de E-o en mia profesia kariero (MÁRKUS Gábor el Hungario), Universitata E-Edukado en Koreio (LEE Jungkee el Koreio), La junulaj movadoj de E-o en Heilongjiang Provinco, Ĉinio (SONG Ping el Ĉinio), E-instruado en japanaj lernejoj (ISIKAWA Tieko el Japanio), Komunaj problemoj pri E-instruado/lernado en ĉinaj altlernejoj (GONG Xiaofeng), Ĉiutaga Esperanto! (PARK Yongseung el Koreio), Lernolibro kaj kurso (YAMASITA Tosihiko el Japanio), Amuza lando de Esperanto (MA Young-tae el Koreio), Mi kaj mia biciklo (Xiong Hui el Ĉinio), kaj invitita leterprezentado de Stefan MACGILL, prez. de ILEI, kun la temo 'Principoj por la 125-parta retkurso'.

La 4-a ISOA okazos en Japanio en la jaro 2014. Transdonante la verdan standardon de korea sekcio al la japana, la 3-a ISOA fruktoplene fermiĝis kun la promeso, ke ILEI-anoj renkontiĝos venontjare en Japanio.

laŭ informoj de LEE Jungkee (Korea sekciestro de ILEI)

Pollando

La Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) kaj ILEI denove kune organizas unujaran instruistan trejnadon, kiu disponigas la bazajn konojn necesajn por instruado de Esperanto kaj trejnos la partoprenantojn pri metodiko. La kursaro necesigas partoprenon dufoje en la surloka intensa semajna sesio (la unua okazos 14-20.09.2013, la dua 01-07.02.2014) kaj intertempan hejman laboradon, retan konsultiĝon kun la kursgvidantoj kaj pretigon de laboraĵo pri metodika temo, kies prezento kun la fina ekzameno okazos en septembro 2014. Aliĝantoj ricevos ILEI-diplomon pri instruista trejnado. Instruistoj: Katalin KOVÁTS, Zsófia KÓRÓDY, Ilona KOUTNY, Tomasz CHMIELIK, István ERTL, Aleksander KORĴENKOV.

Pliaj informoj kaj aliĝo ĝis la 10.08: interlin@amu.edu.pl /
<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>

Svislando

Instruado de E-o okazadas en Centro pri Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) en la urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds [vd *la foton sube*]. Estas nun de jaroj kutimo, ke tien kunvenadas lernemuloj el la tuta Svislando kaj de eksterlando la trian sabaton de ĉiu monato. La instruado okazas laŭ 3 malsamaj niveloj: tutkomencantoj povas veni kaj fari la unuajn paŝojn al plena feliĉo: uzado de nia kara lingvo. Mezuloj plilertiĝas. Spertuloj esploras la vortrezoron de E-o, la tiklajn gramatikajn aspektojn, legas literaturajn tekstojn, interŝanĝas ideojn kaj kune ludas per abunda babilado. Ĉiam estas io lernebla, ĉar neniam oni „regas” lingvon, ĝi estas senfina „arbaro” riĉega. Ĉar Svislando estas plurlingva lando, krokodilado ne okazas en tiaj pluretnaj studgrupoj. Por tia instruado deĵoras skipo el tri instruistoj kaj anstataŭantoj. Komuna tagmanĝo okazas en gaja etoso.

Mireille GROSJEAN



Riskumu kaj gajnu

Meze de aprilo 2013 la porinstruista portalo *www.edukado.net* lanĉis retan kvizludon RISKŬ. Jam la nomo sugestas, ke ne sufiĉas nur koni niajn lingvon, historion kaj kulturon, sed por sukcese "riskumi" necesas ankaŭ iom da strategio kaj bonŝanco.



Ĉiun tagon la ludantoj ricevas maksimume tri demandojn pri E-o: po unu pri lingvo, kulturo kaj movado. Kompreneble la programo al ĉiu ludanto lotumas aliajn demandojn, do la bonŝancoj varias de tago al tago. Nur tiuj, kiuj bone respondis al almenaŭ unu el la unuaj du demandoj, rajtos elekti halti aŭ pluludi kun la ŝanco duobligi la poentojn aŭ perdi ilin. Se oni respondos bone la trian demandon la poentoj duobligos, sed se oni respondos malĝuste oni perdos la poentojn gajnitajn en tiu tago! Necesas respondi la demandojn ene de indikita tempolimo.

La poentoj sumiĝos ĉiumonate, kaj fine de la monato la ganintoj povas elekti el la proponitaj premioj. Estos plia premio por la absoluta gajninto de la tuta jaro. La premioj venas parte de la *Fondaĵo Edukado.net*, sed estas multaj asocioj, eldonistoj, aŭtoroj de libroj kaj diskoj, kiuj subtene al la ludo oferis siajn verkojn. Pliaj donacoj bonvenas: <http://www.edukado.net/adminejo/risko/premioj>.

Jam en la unuaj tagoj estis granda intereso pri la ludo. En la unua semajno 250 personoj registriĝis por riskumi. Ĉirkaŭ 100 membroj de la retejo ludas ĉiutage kaj kun scivolo rigardas dum la tago plurfoje sian pozicion sur la ranglisto.

La ludon elpensis Katalin Kováts, la redaktoro de la retejo, kaj la 1200 diversajn demandojn kolektis kaj enretigis ŝi mem kaj la dana kolego Mogens Rude Andersen. La demandoj ofte ne estas facilaj; citaĵoj, parigoj de aŭtoroj kaj verkoj, datoj kaj okazaĵoj, difino de vortoj, rekono de kantoj, misprononcitaj fonemoj aŭ ekzemple famuloj de la movado, kono de gramatikaj terminoj aŭ konkretaj lingvaj demandoj donas grandan varion kaj starigas la ludanton antaŭ defiojn.

Pere de la ludo la paĝaro celis ne nur ludon kun valoraj premioj, sed ĉefe klerigan agadon, ja ĉiun nokton, fine de la koncerna ludtago ĉiu ludanto, kiu tion abonis, ricevas retmesaĝon pri siaj poentoj kaj la tiun tagon nesciitaj demandoj, kun la ĝustaj respondoj. La ludo estas individua ludo, sed kluboj kaj grupoj povas decidi konkuri inter si pere de la reto. Al instruistoj de grupoj de mezniveluloj aŭ progresantoj ni konsilas direkti la kursanojn al la kultura ludo.

RISKO funkcios kontinue, tra monatoj kaj jaroj, kaj la redaktoro esperas grandnombran partoprenon. En majo komenciĝis nova lud-monato kun novaj ŝancoj. Jam nun valoras elprovi la ludon por akiri spertojn. Ĉiu el vi estas bonvena riskumi en la LUDO-sekcio de www.edukado.net. Rekta ligo: <http://www.edukado.net/ludoj/risko>.

Katalin KOVÁTS

Novajoj pri la 46a ILEI-konferenco en Herzberg/Sieber

Kelkaj informoj, sciindaĵoj pri la organizado de la ĉi-jara konferenco.

ALIĜO: Ĝis 31.03.2013, la fino de la unua aliĝperiodo, alvenis 63 aliĝoj el 25 landoj, el ĉiuj kontinentoj, do ni antaŭvidas vere internacian, varian partoprenantaron. La sekva aliĝperiodo finiĝos en 30.06.2013. Reta aliĝeblo: <http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de/reg.php>

La listo de aliĝintoj kun laŭlanda statistiko estas legebla ĉe <http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de/page.php?pid=27774578>

PROGRAMO: La detala laŭtaga - ankoraŭ provizora - programo legeblas ĉe <http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de/page.php?pid=77711413>. Tio certe helpos al la komitatanoj kaj al tiuj, kiuj ankoraŭ ne certis pri sia alven-tempo kaj ne mendis ekskursojn, partoprenon en la bankedo ktp. Metodika trejnseminario: Jam 12 personoj aliĝis al la seminario, kiun gvidos Katalin KOVÁTS ([edukado.net](http://www.edukado.net)). La detalan temaron bv. legi ĉi tie:

<http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de/page.php?pid=51903533>

Seminario pri ekzamenoj: d-ro Rudolf FISCHER kaj Mireille GROSJEAN atendas ĉiujn, kiuj interesiĝas pri la internaciaj E-ekzamenoj kaj ŝatus

spertiĝi resp. helpi la komparadon de la niveloj en la KER-ekzamenoj kaj en la UEA/ILEI ekzamsistemoj.

Fakprelegoj, prezentadoj: dankon al ĉiuj, kiuj jam ofertis interesajn temojn, edukajn, sciencajn, distrajn. LKK kun danko akceptas ankoraŭ prelegproponojn, kontribuojn al la internacia vespero ktp.

EKZAMENO: dum la konferenco okazos KER-ekzamenoj se estos sufiĉaj kandidatoj. Bv. aliĝi, vi povos akiri prestiĝan ekzamenatestilon en B2- aŭ C1-nivelo. Ekzamenoj okazos kaj en skriba kaj en parola formoj.

EKSKURSOJ: al Göttingen, Hannover, al belegaj kaj historiaj lokoj, al la Harz-montaro kaj Goslar. Informoj ĉe <http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de/page.php?pid=51903533>. Mendu vian partoprenon frue!

TRANOKTADO: Hotelĉambroj por 32-38 EUR, feriodomoj por ĉ. 12-30 EUR. Mendu tranoktadon ĝustatempe, ke LKK povu trovi por vi la idealan solvon. Por junuloj ni ofertas tre bonajn partoprenkondiĉojn, favorajn tranokteblojn, eĉ senpage tendumi eblos en Herzberg. Ruldomoj havos apartan senkotizan parkejon.

SALO 8: la paralela programo de la junularo, la t.n. Somera Arbara Lernejo por ĝemelurbaj lernantoj el Herzberg kaj Góra allogas ankaŭ eksterlandajn gejunulojn, do tiu ĉi ILEI-konferenco estos vere tia, kian indikas la ĉeftemo: io por ĉiuj generacioj.

VOJAĜO al Herzberg/Sieber: bv. kontakti LKK. En Germanio estas multaj rabatkotizaj trajnbiletoj kaj por individuoj kaj por grupetoj de 2-5 personoj. Bv. informiĝi ĉe via flugkompanio aŭ post via alveno en la stacidomo antaŭ ol aĉeti trajnbileton inter la flughaveno kaj Herzberg am Harz.

Kunsido de la Komitato de ILEI en Herzberg/Sieber

La Komitato de ILEI kunsidos kadre de la 46-a Konferenco en Herzberg - Sieber (Germanio, 12-18 julio 2013). La komitatkunsido estas planata en tri partoj: 2013-07-14 je 11:00-12:00, 2013-07-15 je 09:00-12:30 kaj 2013-07-17 je 09:00-12:30. Ĉiuj komitatanoj estas invitataj partopreni. Komitatanoj kiuj ne povos ĉeesti, estas petataj rajtigi anstataŭanton interkonsente kun sia sekcio konforme al la punkto 7.1.2 de la Interna Regularo.

Tagordo

1. Enkondukaj bonvenigo kaj procedurajtoj
2. Ŝanĝoj en la Estraro
3. Honoraj Membroj
4. Novaj sekcioj
5. Raportoj: jara kaj pri la periodo januaro-junio 2013, financa kaj financkontrola
6. Diskuto kaj konkludoj pri la raportoj
7. Resuma prezento de sekciaj raportoj, diskuto pri ili kaj konkludoj
8. Komisionoj: raportoj, proponoj, diskuto, konkludoj
9. Strategio, prioritatoj, sekvindaj gvidlinioj kaj agadplano por la sekva periodo
11. Buĝetoj por la jaroj 2013 kaj 2014: prezento, diskuto, konkludoj
12. Organizaj kaj statutaj demandoj
13. Eksteraj rilatoj (enmovadaj kaj ekstermovadaj)
14. Eldonado, informado kaj komunikado
15. Konferencoj: atingoj, principoj kaj planoj
16. Ceteraĵoj

Zsófia KÓRÓDY
aganta prezidanto

Radojica PETROVIĆ
sekretario

2014: ILEI konferencos en Montevideo

La Ministerio pri Kulturo kaj Edukado de Urugvajo deklaris la 47-an Konferencon de ILEI kiel eventon de kultura signifo. La konferenca preparteamo nun klopodas plej eble bone utiligi tiun altrangan subtenon certigitan pli ol unu jaron antaŭ la evento mem.

La Urugvaja Esperanto-Societo invitis kaj la Estraro de ILEI akceptis, ke la 47-a Konferenco de ILEI en la jaro 2014 okazu en Montevideo omaĝe al la 60-jariĝo de la unua Rezolucio de Unesko pri E-o (Montevideo, 1954). La konferenco okazos en la semajno antaŭ la UK en Bonaero, do inter la 19-a kaj 25-a de julio 2014. La geografia proksimeco de la du ĉefurboj kaj eblo de mallongdaŭra veturo, ĉu fluga, ĉu busa ĉu ŝipa, post la konferenco al UK estis plusa faktoro por akcepti Montevideon por konferencurbo.

La oficiala nomo de la konferenclando – Orienta Respubliko de Urugvajo – aludas al ĝia geografia situo en Latinameriko sude de la ekvatoro: oriente de la rivero Urugvajo, inter Brazilo kaj Argentino, ĉe la bordoj de Atlantika Oceano kaj *Río de la Plata* (Arĝenta Rivero). Ĝi posedas la plej bonan naturan havenon de Sudameriko, kiu historie estis motoro de disvolviĝo de la urugvaja ekonomio. La riveroj kaj iliaj enflantoj estas gravaj trafikejoj, provizantoj de trinkebla akvo kaj, pere de grandaj akvo-baraĵoj, liverantoj de la elektra energio bezonata en la lando. La ebenajĝan reliefon ornamas montoĉenoj, el kiuj elstaras la plej alta Monto Katedralo (*Cerro Catedral*) kun 514m. La klimato estas relative varma kaj humida kun temperaturoj oscilantaj ĉirkaŭ 30°C somere (januaro – februaro) kaj 2-3°C vintre (julio – aŭgusto).

La fekunda grundo kun la favoraj klimataj kondiĉoj apogas eksporte orientitan agrikulturon, kiu laborigas pli-malpli 13% de la laborhavantoj, dum la industrio laborigas 14% kaj servoj 73%. Per siaj komputilprogramaj produktoj kaj konsultservoj Urugvajo okupas rimarkindan lokon sur la informteknologia mapo de la mondo. Kun la dua malplej vasta ŝtata teritorio (post Surinamo), la lando notas daŭran ekonomian kreskon kaj la malplej altan indicon de senlaboreco en Sudameriko. Ĝi havas unu el la plej malaltaj indicoj de analfabeteco en Latinameriko. La edukado en Urugvajo, eĉ la universitata, estas senpaga, kaj la baza kaj mezgrada estas devigaj.

Urugvajanoj devenas ĉefe el Eŭropo, kaj iom el Afriko. Pro tio ĝia kulturo entenas miksaĵon de la du influoj. Tio montriĝas klare en la muzika kulturo, ĉefe per la karnavalo, tango kaj kandombo (*candombe*). **La urugvaja karnavalo** estas la plej longa en la mondo – daŭras tutan monaton kaj eĉ pli. **Tango** (dividata kun Argentino same kiel la kulturo de gaŭĉoj – Gaucho), urba muziko kaj danco, kun tekstoj en loka slango *lunfardo* kaj koreografio kun kompleksaj figuroj, kutimas esprimi malĝojon speciale en amaferoj. **Kandombo**, kolorplena, ritma, afrikdevena parado de dancistoj kaj dekoj da muzikistoj ludantaj tri ĉefajn specojn de tamburoj – piano, ĉiko (*chico*) kaj repiko (*repique*) – naskiĝis en la kolonia epoko kiel la ĉefa amaskomunikilo de la sklavigitaj afrikanoj kuniganta konekton, dancon kaj religion. La historie alternaj konkerantoj de Urugvajo – Hispanio kaj Portugalio – lasis siajn spurojn en la kolonia arkitektura heredaĵo. Ankaŭ alinaciaj enmigrintoj – italoj, germanoj, svisoj, rusoj, hebreatoj, armenoj k.a. – donis sian kontribuon al la kultura riĉaĵo de Urugvajo.

Ĉio ĉi disponigas al la konferenco de ILEI adekvatan fonon por ĝia faka laboro, kiu ĉi-foje enfokusigos latinamerikajn spertojn kaj tendencojn sur la tereno de lingva ekologio sub la lumo de la 60-jara rezolucio de Unesko pri E-o. Pri ĉi tio aparte okupiĝos la tradicia simpozio pri la konferenca temo, inkluziva por ambaŭ grupoj da fakuloj (e-istaj kaj neesperantistaj). Ĉi-foje ILEI organizos la simpozion kunlabore kun ISAE kun espero daŭrigi la kunlaboron en postaj jaroj kaj disvastigi ĝin sur diversajn kunlabor-kampojn. La cetera faka kaj kleriga programo de la konferenco koncentriĝos al plifruktigo de la ILEI-agadaj semoj kiujn en Latinameriko lasis la konferenco kaj seminario de ILEI en Matanzas, 2010, kaj semi novajn.

Ne mankos la tradiciaj kulturaj, distraj kaj turismaj programeroj: interkona frandvespero, nacia, internacia, adiaŭa vesperoj, bankedo, lingva festivalo, ekskursoj. La konferencurbo Montevideo mem, la ĉefurbo de Urugvajo, provizas per abundo da vizitindaj lokoj por duontagaj ekskursoj tra la urbo. Aliaj turismaj celoj por konferencaj ekskursoj proponas sin en aliaj urboj proksimaj de Montevideo kaj en iom pli foraj landpartoj.

Montevideo situas sur bordo de la Arĝenta Rivero, la plej larĝa rivero en la mondo (pli ol 200 km). Ĝi estas ekonomia, administra kaj kultura centro, sidejo de la registaro kaj de ŝtataj entreprenoj. Pli ol 150 000 arboj ornamas ĝiajn stratojn, ampleksajn avenuojn kaj bulvarojn, dum 2 600 hektarojn okupas verdaj placoj kaj parkoj.

La ĉefaj vidindaĵoj estas: la malnova urbo, tipa kolonia urbo en formo de ŝaktabulo, ĉirkaŭita de muregoj. Ĝi entenas la plej belajn konstruaĵojn de la kolonia epoko, kaj de la unuaj jardekoj de la sendependeco. Tie troviĝas entreprenoj, ŝtataj ministerioj, bankoj, kaj en la lastaj jaroj ĝi, per gravaj transformoj realigitaj de la urba registaro, iĝis centro de la nokta vivo por urbanoj kaj turistoj, kun pluraj diskotekoj kaj noktaj trinkejoj.

Aliaj programaj, kulturdistraj kaj turismaj celoj, enhavoj kaj logaĵoj kune kun aliĝkondiĉoj kaj loĝofertoj, estos prezentitaj per konferencaj komunikoj kaj tra aliaj komunikkanaloj, kaj speciale en tiutema programero de la ĉi-jara konferenco julie en Herzberg-Sieber, kiam estos startigitaj la aliĝado kaj mendoj por la 47-a Konferenco de ILEI en Montevideo 2014.

Bonvenon!

*Radojica PETROVIĆ,
estrarano pri konferencoj de ILEI*


Nekrologoj

Saranath (Sarasavani Vaidyanath, 1922- 2011)

Konata e-ino, s-ino Saranath (Whitefield, Bangaloro) kiu ekde 1981 laboris por la E-movado, forpasis la 20-an de februaro 2011. Ŝi laboris senlace por propagandi E-on en Barato, speciale en Suda Barato. Ŝi lernis E-on de s-ino Haudebine franca esperantistino en Nov-Delhio, kiam ŝia edzo K. Vaidyanath, alia fama e-isto, laboris ĉe la Hinda fervojo en Nov-Delhio. Lingvistino, ŝi havis licencion de la angla lingvo, kiu interesiĝis pri lingvoj. Bonŝance la E-movado trovis ŝin kaj ŝi klopodis disvastigi nian lingvon. Ŝi iĝis membro de Hinda E-a Asocio, kiam ĝi fondiĝis en 1982 en Barato, kaj restis membro ĝis la morto. Ŝi estis ankaŭ fama dancistino de *Baratanatiam*, la fama danco en Barato. Ŝi kontribuis al la E-movado pere de anekdotoj, kantoj, etaj rakontoj kun belaj bildoj de Barato, speciale pere de *Juna amiko*. Ŝi ankaŭ instruis en multaj lernejoj en Suda Barato. Ŝi prelegadis krome en malaltnivelaj universitatoj. Ŝi dediĉis sian vivon al la E-movado.



Venkatesh REDDY



Manfred RITTHALER (1933-2012)

Li naskiĝis la 12an de marto 1933 kaj mortis la 29an de novembro 2012, postlasante la edzinon, du gefilojn kaj kvin genepojn. Li laboris unue kiel poŝt-dungito kaj poste ĝis la pensiiĝo kiel instruisto en Hambach, parto de la palatinata urbo Neustadt an der Weinstraße, Germanio. E-isto de junaĝo, li estis delegito de UEA, membro de GEA, ILEI kaj IKUE, estrarano de la E-Labor-unuiĝo en la diocezo Speyer, longjara E-kursgvidanto en la popolaltlernejo kaj malavara gastiganto de e-istaj geamikoj. La nekrologo en la entombiga ceremonio resumis: Ne nur instruisto li estis kun fervoro.

Albrecht KRONENBERGER

Boriša Milićević (Serbio, 1931 - 2013)

Boriša Milićević, diplomita filologo, naskiĝis la 14-an de oktobro 1931, esperantistiĝis en la jaro 1953 kiel studento en Beogrado, kaj forpasis la 2-an de februaro 2013. Li estis direktoro de E-Instituto de Serbia E-Ligo ekde 1984 kaj ĝis la lastaj tagoj de sia vivo li vigle komuniĝis kun aliaj E-institutanoj pri aktualaj aktivaj kaj novaj planoj.



Boriša estis kunfondinto de Studenta E-Klubo en Beograd kaj li plenumadis diversajn funkciojn en pluraj E-societoj kaj en la E-Ligoj de Vojvodino, Serbio kaj Jugoslavio. Li estis ĝenerala sekretario de TEJO (1955-56), Komitato A de UEA por JEL (1977-1979, 1983-1986, 1992) kaj UEA-delegito en Novi Sad. Lia E-agado lasis profundajn spurojn sur la kampoj de E-instruado, E-ekzamenoj, tradukado inter E-o kaj aliaj 8 lingvoj kiujn li scipovis, E-bibliografio kaj ĵurnalismo, kun multaj verkoj publikigitaj libroforme, en E-aj kaj nacilingvaj revuoj, aŭ kiel konferencaj prelegoj.

Lia Esperanta kaj faka agado estis rekonata ankaŭ ekstermovade. Li estis distingita de la Prezidanto de Respubliko per Medalo de Laboro, li ricevis Ordenon por meritoj en la E-movado de Jugoslavia E-Ligo, Oran Insignon de Serbia Kultur-kleriga Komunumo, Medalon de Serbia Unuiĝo de sciencaj kaj fakaj tradukistoj kaj aliajn rekonajn.

Radojica PETROVIĆ

Reagoj

Pri lingvo per simplaj vortoj

En la artikolo ‘Invito al la tuta vasta mondo’ (IPR 12/4) estas prezentita la pozitiva rolo de moderna natura lingvo – Esperanto – en la instruado de fremdaj lingvoj al 5- ĝis 11-jaraĝaj infanoj.

Ĉe tradicia procedo oni mezuras lernatan lingvon per la malfacila denaska, aŭ per alia bone konata lingvo. Sed la homaro jam antaŭ longe venis al kompreno pri tio, ke mezurilo devas esti pli simpla kaj pli universala ol la

mezurata objekto. Kaj konforme al tiu ĉi principo, E-o estas pli konvena por komparmezo de alia lingvo, ol iu ajn alia lingvo.

Ni komparu du malsamajn opiniojn pri la naturo de lingvo.

En Vikipedio oni povas trovi la sekvan opinionon.

Lingva leĝo montras ĝeneralajn regulojn, kiuj karakterizas tiun aŭ alian nivelon de la homa lingvo ĝenerale. Alivorte tiuj, kiuj nomiĝas lingvistikaj ĝeneralaĵoj, ekzemple, la lingva duaspekteco (la ekzisto en ĉiu lingvo de esprima aspekto kaj de enhava aspekto). Kaj krome la leĝo montras ankaŭ specialajn regulojn – tiujn, kiuj karakterizas la evoluon de fonetikaj, morfologiaj, leksikaj kaj aliaj apartaĵoj de konkreta lingvo enkadre de la parolprocedo.

El la sama fonto oni povas ekscii ankaŭ, ke *parolo estas historie formiĝinta modelo de interhoma komunikado pere de lingvaj konstruoj ellaboritaj surbaze de difinitaj reguloj. La parola procedo konsistas, de unu flanko, el formado kaj formulado de penso pere de lingvaj (parolaj) rimedoj, kaj de alia flanko – el ricevo de la lingvaj konstruaĵoj kaj ilia kompreno.*

Ĝi aspektas tre solide kaj montras direktojn de certaj sciencaj okupoj. Sed ŝajne en ĝi temas ne pri natura lingvo, kiu aperis kaj evoluas laŭ objektiva leĝo de la naturo, sed estas ellaborita surbaze de certaj reguloj por aperigi sociajn leĝojn, direktivojn kaj instrukciojn. Tiuspeca lingvo estas taŭga ankaŭ por plani teĥnologiajn procedojn kaj eĉ tiujn, laŭ kiuj oni faras sciencajn esplorojn.

Sed pedagogoj instruas naturan lingvon, destinitan por la ĉiutaga kunagado de la homoj. Do, eble, ili prezentu la lingvon uze de simplaj vortoj de la natura lingvo, kiun feliĉe sukcesis ricevi la infanoj, kiuj ankoraŭ ne havis okazon konatiĝi kun lingva analizo, plenumata en terminoj de lingvouza instrukcio. Sed kiu distingo estas inter tiuj du lingvoj?

La natura ja aperis pli frue ol la lingvo destinita ĝin normigi. Kaj ĝi ja estas grava parto de la nacia materia kulturo, kies evoluon studas filologoj.

Sed estus inde koni la kriteriojn, kiuj ebligas ne miksi naturajn objektojn - kaj inter ili ankaŭ lingvojn - kun planitaj kaj artefaritaj objektoj. Sciante ilin oni povas distingi la objektivajn leĝojn de la subjektivaj, ellaboritaj por normigi homajn interrilatojn.

Konforme al tiuj kriterioj E-o estas inventita kaj evoluas laŭ tute samaj postuloj de objektiva leĝo de la naturo, laŭ kiuj evoluas ĉiuj naciaj lingvoj.

Kaj krome, Esperanto estas tiel klara lingvo, ke oni povas el ĝi pli simple ekvidi lingvan leĝon de la naturo, ol el ceteraj lingvoj, de kiuj ne estas eble same simple ekvidi ĝin pro troa pezeco de iliaj eksteraj formoj.

Tiuj ĉi kvalitoj de E-o ebligis uzi ĝin ĉe instruado de infanoj, pri kiu temas en la supre menciita artikolo el IPR 12/4. Kaj danke al tiu avantaĝo de la instruado surbaze de E-o eblas proksimigi la lingvolernan procedon al tiu, laŭ kiu la homo en sia infana aĝo ekposedas la gepatran lingvon.

Ĉiu e-isto senpere konas la avantaĝojn de E-o. Sed speciale por instruistoj, kiuj dume ne konas E-on, estas bezonate mallonge diri pri ĝiaj avantaĝoj:

- La plej grava avantaĝo de E-o estas tiu, ke pere de ĝi estas eble ne nur estigi imagon pri la lingva fenomeno ĝenerale, sed ankaŭ pri la postuloj de la objektiva leĝo de la naturo, laŭ kiu evoluas ankaŭ ĉiuj naturaj lingvoj – naciaj lingvoj.
- Naciaj lingvoj havas sufiĉe pezan eksteran formon (lingvan kodon), ke, se figure paroli, ĉe ĝia instruado ne la korpo gvidas la voston (ne la imago estas antaŭ la formo), sed la vosto gvidas la korpon (instruado baziĝas sur prezento de la formoj). Se oni uzas ĉe la instruado E-on en la rolo de kompara mezurilo, tiuokaze aperos la eblo pli nature vicigi la temojn.
- Danke al la reguleco kaj klareco de la E-vortara konsistaro, ĝiaj elementoj povas esti uzataj en la rolo de enklasigiloj. Do tiam oni ne nepre bezonos uzi iun ajn specialan terminaron.
- La E-vortaro entenas relative malgrandan kvanton de la vortoj, el kiuj danke al unika sistemo de vortkreado ĝia fakta amplekso estas pli granda, ol ĉe iu ajn alilingva vortaro.
- E-o estas mirinde fleksa lingvo. Tion oni povas ekvidi legante, ekzemple, verkojn de István Nemere kaj de multaj aliaj verkistoj kaj poetoj. Similan fleksecon povas havi sen risko de intervorta kolizio neniu alia lingvo.
- Frazaj reduktaĵoj, pro la bezono optimumigi la lingvouzon, ekzistas en ĉiuj naturaj lingvoj. Kaj ofte nur samlandanoj kapablas prezenti la reduktitan frazon en ĝia disvolvita formo. E-lingva stilo estas dekomence reduktita. Tamen la enfraza intermembra ligaro klare montras la eblon kompreni, kiuj vortoj restas subkomprenataj.

- Pro la diverseco de la vojoj, laŭ kiuj evoluis la lingvoj, ene de naciaj lingvoj ‘kreskis’ malsamaj geneologiaj vortkreaĵoj. Pro tio estas problemo ĉe identigo de t.n. samsignifaj vortoj de komparataj lingvoj, se mankas konforma ekstera etalono. Forigi la problemon estas eble eldonante klarigvortarojn kun klarigoj en E-o.
- Uze de E-o estas eble praktiki instruprocedon sen uzo de speciala klasifiga terminaro, ĉar tiu estas interne de E-o.

Lerno de fremda lingvo, proponata per lernolibroj de plenkreskuloj, ofte similas ludon, laŭ kiu infanoj konstruas el apartaj ludelementoj iun konstruaĵon, aŭ maŝinon. Kaj por tio estas aldonata teĥnologia instrukcio sub la nomo de lernolibro, en kiu mankas loko paroli pri la lingvo per simplaj vortoj. Sed kial do ni ne eldonu kvazaŭ rektan metodon de la uzo de E-o?

La efiko de la kvazaŭ rekta metodo baziĝas sur tio, ke la lernanto antaŭe bezonas reveni al la komenco – malleviĝi de la propra gepatra lingvo al baza nivelo (kvazaŭ tute forgesante sian propran nacian lingvon). Kaj de tiu punkto li helpe de instruisto sinsekve leviĝu al reinventanto de nova parola lingvo.

Ĉiu nacia lingvo estas treege ampleksa. Por optimumigi la procedon, oni konsideru, ke estas ne racie antaŭ ĉio lerni la bildigan parton de la lingvo. Estas certe, ke la frazo prezentas nur unu strekon de la bildo. Kaj por bildigo estas bezonataj multaj strekoj. Sed estas kategorio de apartaj – memstaraj frazoj – la frazoj portantaj aktualan informon, laŭ analizo de kiuj estas eble disvolvi prezenton de ceteraj scioj pri la lingvo. Kaj nur pli poste estus inde prezenti klasigan analizon de la lingvo, sed eĉ tiun estas eble plej parte plenumi uze de la konformaj ebloj de E-o.

Por fari la lingvolernon pli sistema, estus inde konsideri, ke fakte ĉiu elementa frazo konsistas el nur kvar apartaj (praktike sendependaj unu de la alia) partoj. Unu el la partoj prezentas tiun (aŭ tion), pri kiu (aŭ pri kio) oni informas. La dua parto prezentas la informon mem. La tria prezentas la subjekton (aŭ objekton), al kiu la informata ago estas direktita. Kaj la kvara parto montras punktojn de certa multmezura tempo-spaco, kiujn koncernas la priinformata evento. Sed transirante de la aktuala frazo al ĝia vortara konsisto (al la modeloj de la aktualaj partoj de la frazo) oni povas rimarki, ke ĝiaj E-lingvaj formoj havas indikojn de sia destino. Unuj el tiuj prezentas el si la rolon de siaspeca frazoparta mezurunuo, sed la aliaj estas

destinataj montri la kompar-rezulton de aktuala valoro kun ilia envortara etalono.

En la E-vortaro estas ankaŭ unikaj kunlig-elementoj, pere de kiuj estas eble montri la strukturon de ĉiu ajn frazo en ĝia abstrakta (en formula) formo. La listo de tiaj abstraktaĵoj povus esti utila almenaŭ por aperigi plenan kompletan de frazaj formoj, kio siavice ebligis optimumi komparan studon de la lingvoj. Simila eblo malestas ĉe ceteraj lingvoj.

Kaj kion celas la mallonga informo prezentita ĉi-tekste? Estas espero, ke inter la legantoj de IPR troviĝos ankaŭ tiuj, kiuj estas pretaj pridiskuti la temon kaj, eble, eĉ partopreni en kolektiva ellaboro de eleganta kvazaŭrekta metodo de krea lingvolerno surbaze de la objektiva leĝo de la naturo.

Vilorg TERÄVÄINEN (Finlando, vilorg@elmi.fi)

Internaj kaj eksteraj kondiĉoj de evoluo

Iuj samliganoj eble memoras pri mia (kvankam ne tre ofta) rolado en ILEI, inkluzive de tiu en IPR, kaj nun eble demandas sin, kio igis min reveni en la Ligon. Mia respondo estus tio, ke la motivo por tio originis ne el ia antaŭa intenco, sed prefere el la (iom hazarda) ricevo de la lasta n-ro de IPR, kiu revekis mian pli fruan interesiĝon pri la Ligo, krome el la informo, ke la Ligo baldaŭ ekhavas novan prezidanton.

Verdire ekzistas ankaŭ pli konkreta motivo por tio: nome tio, por kio mi voĉadas ankaŭ aliloke, kaj kies rilato al la instruado estas tre strikta. Permesu al mi skizi tiun „kion” ĉi tie.

Mi eliras el la cirkonstanco, ke E-o, malgraŭ sia „eŭropeco”, ne atingis eĉ niatage tiun rangon en la instruplano de eŭropaj lernejoj, kian ĝi sendube meritis, se ne pro aliaj konsideroj, tiam pro la ne tre altaj sukcesoj, atingitaj (kaj –ataj) en la instruado de fremdaj lingvoj ĝenerale. Tiu ĉi cirkonstanco estas objektiva: ni vane gurdadas niajn argumentojn ĉu rilate la propedeŭtikan, ĉu rilate la „demokrati-emajn” flankojn de la afero. Aperas nenia signo de tio, ke oni volas plialtigi la statuson de E-o tie kaj ĝenerale ankaŭ ali-terene. Se mi ne eraras, kelka progreso demonstreblas precipe en la instruado de la lingvo en ne-eŭropaj landoj, kie E-o, kiel kuriozaĵo, ankoraŭ faras kelkan allogan efikon.

Tiu ĉi cirkonstanco, kvankam ne favora, ebligas al ni, instruistoj kaj e-istoj, dediĉi pli da atento ankaŭ al tiuj flankoj de la instruado, kiuj, malgraŭ malaj taksoj je unua rigardo, rilatas pleje rekte al la instruado de E-o. Tiuj flankoj konkrete estas: la instruota lingvo mem kaj la interrilato inter la instruado unuflanke, la por-E-a laboro de e-istoj kaj la sociaj cirkonstancoj aliflanke. Mi iom detalas ĉiun el ili.

E-isto de preskaŭ 40 jaroj kaj konanto de pluraj etnaj lingvoj, mi kuraĝas aserti (riskante la stampon de herezeco), ke E-o, malgraŭ ĉiuj siaj nedebateblaj valoroj kaj avantaĝoj (super kaj etnaj kaj aliaj artefaritaj lingvoj), la rangon de sufiĉe poluriĝinta lingvo ankoraŭ ne atingis. Entute: tia poluriĝo de lingvo kun ne pli ol 125 jaroj da ekzistado, kian etnaj lingvoj pleje atingis jam antaŭlonge, apenaŭ atendeblas. Malgraŭ ĉi tio, pri la atingiĝoj en la lingva evoluo de E-o ni devas ne honti, sed fieri. La lingvo tamen – ne multerilate! – bezonus evoluigon, unuecigon, ĉar la vortuzado estas ne sufiĉe stabila, pro kelkaj pliaj trajtoj E-o impresas ne kiel lingvo „plenkreskinta”, sufiĉe matura. Ĉi tio validas ankaŭ pri la tradicia lingvo: sufiĉas mencii, ke sole en la lasta n-ro de IPR mi kalkulis ne malpli, sed pli ol 10 tiajn kazojn, kie la inversa vortordo estis senmotive uzita. Sed kiel heredigi pli bonan E-on, se ni oftakaze opinias eĉ tiun lingvan elementon ĝusta, kies ĝusteco estas debetebla?

Ni devus ankaŭ tion ekzameni, ĉu la motivoj por eklerni E-on estas sufiĉe fortaj, ĉar mia opinio ili estas ne tiaj. Instruante E-on, ni havigas la konon propre de tia lingvo, kiu ankoraŭ estas for de la statuso de socie bezonata komunikilo, ĉar, krom niaj arte organizitaj uzebloj (kunvenoj, kongresoj k.s.) kaj la povo legi / aŭskulti ĝiajn kulturaĵojn, ĝi estas ne uzebla, dum en la instruado de la konkuranta angla lingvo tia malhelpo ne ekzistas, eĉ... La kolegoj povus rajte kontraŭjeti al ĉi tio, ke la tasko forigi ĉi tiun malhelpon koncernus plie la ceterajn organizaĵojn, sed kion fari, se tia emo tie ne ekzistas?

Estu permesate mencii ion, pro kio oni ĉi tie povus eble pli rajte protesti: nome tion, ke la grado de interesiĝo pri E-o (resp. de la emo ĉe la koncernaj registaraj instancoj integri E-on en la lerneajn instruprogramojn) grandmezure (se ne plej) dependas ankaŭ de la socia sistemo reganta kaj la politika-ekonomia interrilato de la unuopaj landoj. Por ilustrati ĉi tion, mi mencias, ke antaŭ la sistemŝanĝo la ŝancoj por E-o iĝi instruata en lernejoj en Hungario (almenaŭ kun eksperimentaj celoj) estis sinkrone kaj diakrone

plej favoraj – i.a. tial, ĉar la laborejoj (tiam ekskluzive hungaraj!) ne postulis de kandidatoj por laborlokoj la konon de la lingvo de la eventuale dungantaj laborej-mastroj, kiel nun. Ĉar nun la tuta sistemo de la instruado de fremdaj lingvoj estas submetita al ĉi tiaj bezonoj, el kio sekvas ankaŭ la nuna mizera statuso de E-o (ne nur en Hungario). Estus necese kunligi la lukton por E-o kun tiu por la antaŭenigo de la socia evoluado.

Fine ion pri la nova gvidantaro de ILEI: mi deziras tian prezidanton novan, kiu ne malhelpas la atentigon pri tiaj konsideroj kiuj, kvankam ŝajne de sekundara graveco, tamen necesas el la vidpunkto de la evoluado de E-o. Ĉi tiu bezono plej certe kontentigeblas per tia balotado, ĉe kiu la anoj elektas ne inter personoj, sed inter iliaj programoj, starpunktoj, resp. en kolektiva, demokratia gvidmaniero.

Johano PETIK (Hungario)

Informoj pri ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Mireille Grosjean (prezidanto), Mónika Molnár (vicprez.), Karine Arakelian (sekretario, arkivisto), Leysester Miro, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Tiekoo Isikawa, Ana Montesinos de Gomis.

Kontrolo: Ulla Luin, Simon Smits, Rudi Koot.

Lerneja: Julián Hernández (gvid.), Carola Antskog, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Tiekoo Isikawa, Marija Jerković, Luigia Madella, Jacqueline Poux, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Beloŝeviĉ, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas (Estrare: Stefan MacGill).

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny (Estrare: *vakas*).

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Aida Ĉiĝikaitė, Renato Corsetti, Ilona Koutny, Radojica Petroviĉ, Kristin Tytgat.

Kunlaborantaj institucioj

EEU: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brökärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, cantskog@kolumbus.fi.

E@I (Edukado ĉe Interreto): Viĝazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net.

Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj

Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74. NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando.

Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49)55215983, Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono:

Zsófia Kóródy, zsafia.korody@esperanto.de.

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Bharat Ghimire**.

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Petra Smidéliusz**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org. Observanto kaj A-komitatano de ILEI ĉe UEA: **Stefan MacGill**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Claude Nourmont**.

UN (Unuiĝintaj Nacioj): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro**.

UNESKO (en neformalaj rilatoj): Reprezentantoj de ILEI: **François Lo Jacomo**, 72, quai de la Loire, FR-75019 Paris, francois.lojacomo@wanadoo.fr; **Monique Arnaud**, Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60.

Membreco kaj pagado por aliaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj.** Bonvenaj estas donacoj al la fondadoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por *Juna amiko*. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al Vilĝjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>.

La pagoj povas okazi pere de la nederlanda ILEI-konto, al la ILEI-konto ĉe UEA aŭ al la sveda konto:

* Pagoj al la nederlanda konto de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bv. aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo).

* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankkostoj. Indiku viajn nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-1 (*Juna amiko*), pike-b (projekto *Interkulturo*).

* Pagoj al la sveda bankkonto: En Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Swedbank.

El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT-kodo SWEDSESS.

Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.

* Simpla abono de IPR sen membreco: 20 €. Reklamtarifoj por IPR: 180 € por plena, 110 € por duona kaj 70 € por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Hejmpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIĘBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem*. **Presado**: Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio*, tel: (+32-3)-234 34 00. **Redaktejo**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, <jozefo.nemeth@gmail.com>, <http://www.ilei.info/ipr/>; tel: (+36-70) 931-0530. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, <moerbeek@gmail.com>.

La nunan numeron ni sendis al la presejo la 6-an de majo 2013, redaktofino por la sekva numero: la 15-an de aŭgusto 2013.




Lernantoj el Herzberg kun siaj italaj gastigantoj dum urborigardado en Mazara de Vallo, Italio (Komenius-projekto GUTO, vd p.23.)



La 3-a ISOA en Koreio (vd p.26.)

Montevideo alvokas:



**Venu al Herzberg - Sieber 2013
kaj aliĝu al Montevideo 2014**